

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*



2012

2

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2012. №2 (208)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Mojajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2012**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 27a paĝo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 600 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2012, №2 (202).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 23 января 2012 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Redakcie

**L**a februara kajero ĉiam estas iom speciala. Ne nur pro tio, ke ĝi estas je kvar paĝoj pli ampleksa ol la aliaj *Ondoj*. Ja ni pretigas ĝin en la mezo de la unua monato de la jaro, kaj ĉiujare en ĝi aperas tekstoj, kiuj diversmaniere resumas la pasint-jaran agadon.

Ne ĉiun el la kutimaj februaraĵoj vi trovas ĉi-foje, ĉar ni devis pasint-jare rezigni la organizon de la konkurso *Liro* kaj de la Internacia Fotokonkurso, kies rezultoj ĉiam estis anoncataj en la februara *Ondo*. Tamen ĉiujn aliajn tradiciajn februaraĵajn tekstojn vi trovas ankaŭ nun.

Dennis Keefe, kiu nun instruas en la Esperanto-Insulo, respondas al niaj demandoj. Pro la interesaj respondoj de Dennis, ĉi-jare la tradicia intervjuo kun la Esperantisto de la Jaro duoble superis la kutiman amplekson, kaj la temaro ne estas elĉerpita — atendu lian artikolon pri la maniero disvastigi Esperanton, kiun li nur kelkfrazo skizis en sia respondo.

En nia tradicia *Ronda Tablo* la (eks)gvidantoj de UEA, SAT, Civito kaj aliaj aktivuloj rakontas pri la pasint-jaraj sukcesoj kaj fiaskoj en Esperantujo. Ĉiu el ili havas sian propran imagon kaj sian propran stilon, kiuj ne povas plaĉi al ĉiu. Sed Esperantujo estas tia, kia ĝi estas, kaj la respondoj aperas tiaj, kiaj ili estas — sen cenzuro kaj kombo. (Ĉi klarigon ni faras pro iu, kiu dum jaroj private kaj publike ĉikanas nian gazeton ĉar liaj verkoj, farĉitaj per obscenaĵoj, ne aperas en *La Ondo*, dum aperas verkoj de tiuj, kiujn li ne ŝatas.)

En ĉi tiu *Ondo* vi trovos ankaŭ la tradician revuon de la pasint-jara libroproduktado, kaj vi rimarkos, ke nia eldonmarko *Sezonoj* mankas en la listoj por 2011. Efektive, ekde 2006, ni devis pro sanproblemoj draste redukti nian Esperanto-aktivadon, rezigni la instruadon, vojaĝojn, organizadon, kaj nia ĉefa zorgo restis nur *La Ondo*. Ankaŭ nia eldonado ŝrumpis — dum kvin jaroj ni nur reeldonis pli fruajn verkojn (Tolkien, *Nia trezoro*), aperigis rezultojn de la delonge komencitaj projektoj (Borges, *Homarano...*) aŭ eldonis verkojn pretajn, kiuj preskaŭ ne bezonis redaktadon. Kaj en 2011 aperis nur la dua eldono de *Homarano*. Sed danke al la sukcesa operacio ni ekrevenas al la eldonado, kaj jam ĉi-jare enmondiĝos kelkaj libroj de *Sezonoj*, pri kiuj ni baldaŭ informos.

Ĉi-kajere aperas ankaŭ nia abon-statistiko, mirinde pozitiva pro la kresko je 47 abonoj. Post la transiro de la 500-persona abonantaro ni neniam havis tiel grandan kreskon. Ne fali reen estas defio, sed ĉiu el vi povas helpi: per (re)abono, diskonigo de *La Ondo* en kluboj kaj renkontiĝoj, abonigo de tiuj kiuj mem ne povas paŝi la abonon, kaj per donaco al nia *Abonhelpa fonduso*.

Ni esperas, ke vi restos kun *La Ondo* ankaŭ ĉi-jare!

**HaGo**

**AIKO**

Kompreneble, en la februara kajero estas pluraj tekstoj kaj fotoj pri la Zamenhof-Tagaj kaj Silvestraj aranĝoj, ankaŭ pri JES en Gdansko. Foto pri ĝi videblas ankaŭ sur la kovropaĝo: la ĉeforganizanto Irek Bobrzak kaj la ĉefgasto Lech Wałęsa. (*Fotis Ivo Miesen*)

# Jaro 2011: Niaj atingoj kaj fiaskoj

Inter la “Rondaj Tabloj” de *La Ondo de Esperanto* la plej konata estas la jarŝanĝa. Ankaŭ ĉi-foje ni petis diverstendencajn aktivulojn respondi la demandon: “Kiu(j)n Esperanto-evento(j)n en 2011 vi taksas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?”

**Probal Dasgupta**  
**Barato**  
**Prezidanto de UEA**

Mi plej ĝojis pri la ĉi-jaraj trafaj ĉe internaciaj organizaĵoj — ekzemple, la sukceso de la reprezentantoj de UEA sub la gvido de Stefano Keller akceptigi en preparkonferenco en Bonn amendon en la projekto de la 64-a NRO-konferenco de UN (la tiel nomata “Rio-plus-20”, kiu enfokusigos la medion) favore al lingvaj rajtoj kaj kultura diverseco, eĉ kun propono konsideri la potencialon de neŭtrala internacia lingvo. Pri alia grava ekzemplo respondecas Mélanie Maradan, kiun UEA elektis kiel komisiiton por rilatoj kun Internacia Normiga Organizaĵo (ISO) kaj kun la terminologia informejo Infoterm. Ŝi, interalie, atingis, ke en la teknika komitato ISO/TC 37 (kiu okupiĝas pri la “terminologio kaj aliaj lingvaj kaj enhavaj resursoj”), ĉiuj kvar subkomitatoj (SC 1 “principoj kaj kunordigado”, SC 2 “terminografiaj kaj leksikografiaj labormetodoj”, SC 3 “sistemoj por administrado de terminologio, scio kaj enhavo”, kaj SC 4 “administrado de lingvodatenoj”) unuope akceptu UEA kiel membron.

Elstarigon de negativaj eventoj ni uzu kiel okazon por iom amuzi nin. En tiu humoro mi elstarigas mian nedisponon de martelo por prezidule malfermi kaj fermi la Universalan Kongreson en Kopenhago. Espereble ne tro malbone impresis miaj elturniĝoj. Se oni ne povas ripari la fuŝetadon, oni almenaŭ plenpulme ridu pri ĝi — en movado kie la ridado estas ege necesa kaj ne sufiĉe ofte disponebla, almenaŭ mi povas kontribui mian neofendiĝon pri tio.

**Jakvo Schram**  
**Belgio**  
**Eksprezidanto de la Plenumkomitato de SAT**

Grava, laŭ mia opinio, estas la laboro de tiuj homoj kiuj agadas por prezenti bonkvalitajn revuojn kaj la laboro de Katalin Kováts kiu, en la tempo kiam homoj malpli ŝatas sekvi kursojn pri Esperanto en propra regiono, daŭre luktas por doni altkvalitan edukadon al tiuj, kiuj uzas la reton. Ankaŭ pozitiva estas, ke la fratoj Vito kaj Vinko Markovo faris puĉon en SAT kaj forpelis min kiel prezidanton. Mi dankas ilin por forigi min el totalisma strukturo.

Negativa estas la aĉa maniero, kiel Georgio Silber manipulas la verojn uzante HeKon, *Heroldon*, kaj la strukturo kaj agado de la Civito, kiu kvazaŭ kiel eta ŝtato fifamigas la idearon de Zamenhof. La opereta maniero kiel ili donas unu al alia infancajn titolojn. Vere, estas mia espero, ke tiu makulo al Esperanto kiel eble plej baldaŭ malaperos, por ke ĉesu la sensencaj atakoj al aktivuloj kiuj ne adoras, sanktigas Silber kaj lian klikon.



**Grigorij Arosev**  
**Ruslando**  
**Prezidanto de Rusia Esperantista Unio**

En 2011 mi ne tre atente sekvis la internaciajn novaĵojn, tial ekster niaj landaj aferoj mi menciis nur la unuan IJK en Ukrainio. Sed ĉefaj eventoj estas por mi ligitaj kun REU. Pozitivaj estas la nova estraro, kiu eklaboris post la oktobra konferenco, kaj agado de la nova estraranino Arina Osipova (mi mencias ŝin aparte ĉar ŝia involviĝo kaj partopreno estas jam grava). Estas pluraj novaj ideoj kiujn ni, certe kun la ceteraj estraranoj, esperas realigi en 2012 kaj poste.

Plia impresoj estas samtempe kaj pozitiva kaj negativa: temas pri mia artikolo “Kio estas la reala trezoro de REU?”, kies samtempa aperigo en *La Ondo de Esperanto* kaj *Rusia E-gazeto* kaŭzis multajn reĥojn, inter kiuj estis kaj subtenaj, kaj oponaj (kio estas bona, ankaŭ la kritikaĵoj, se ili estas esprimataj etike kaj ĝentile), kaj senbaze insultaj kaj eĉ ofendaj (malbone). Ĉio ĉi konvinkis min pri la ĝenerala praveco, kvankam kelkaj aferoj estas formulendaj per aliaj vortoj.

**Peter Baláž**  
**Slovakio**  
**Kunordiganto de E@I, estrarano de EEU, eldonisto**

Mi dividos mian respondon al “internaj” mal/sukcesoj — kiuj rekte rilatas min kaj “eksteraj” mal/sukcesoj — kiujn mi povis observi.

Internaj sukcesoj: okazigo de SES 2011 kun 191 partoprenintoj el 25 landoj; nova lingva EU-projekto “Deutsch Online”; finpretigo de la retejo slovake.eu; eldono de libro *Život Zamenhofa* — slovakaj traduko de la verko de Aleksander Korĵenkov; sukcesa fino de la Interlingvistikaj Studoj en Poznań; la unua Esperanta Vikimano en Svitavy.

Internaj malsukcesoj: malfruo kun funkciigo de du gravaj retaj projektoj: aktuale.info kaj bretaro.net; daŭre relative malmultaj E@I-aktivuloj, ekzemple, en Azio.

Eksteraj sukcesoj: vigla funkciado kaj kresko de Edukado.net kaj la agado de Katalin Kováts ĝenerale (RITE, KER-ekzamenoj ktp.); daŭrigo de Interlingvistikaj Studoj en Poznań (estis risko de nuligo de la studoj); progresoj en ILEI-agado (konferenco, eldonado, reformoj); resaniĝo de Halina Gorecka kaj financa helpemo de esperantistoj por tio; lanĉo de la Esperanto-retradio *Muzaiko*; daŭra informado de *Libera Folio* kaj daŭre profesie eldonata *Beletra Almanako*.

Eksteraj malsukcesoj: malfeliĉa provo forigi redaktoron de la revuo *Esperanto* (anstataŭ unue havi klaran ideon pri la redakto-politiko kaj strategio pri moderna informado ĝenerale); ioma stagnado en UEA-moderniĝo.





**Ilona Koutny**

**Pollando**

**Gvidanto de Interlingvistikaj Studoj  
ĉe la Universitato Adam Mickiewicz**

En la tereno de instruado estis kelkaj pozitivaj eventoj:

— startis la kvina interlingvistika grupo en UAM (Poznań), kie la universitataj gvidantoj rekonis mian interlingvistikan agadon kiel valoran;

— komenciĝis plene reta instruista kurso de esperanto kaj plialtiĝis la nombro de KER-ekzamenitoj (eĉ ekster Eŭropo) dank' al la senlaca laboro de Katalin Kováts;

— organiziĝis la Esperanta Insulo, plenmonata instruado de Esperanto, de metodiko kaj de aliaj kursoj dank' al la sindediĉo de Denis Keefe;

— aktive reprezentiĝis UEA ĉe UN.

Elstare grandan negativan eventon nun mi ne vidas, sed daŭre mankas la fortoj por serioza esplorkonferenco, efika varbado por Esperanto, anstataŭ kunlaboro okazas pli ofte kvereloj.

**Vinko Markovo**

**Germanio**

**Prezidanto de la Plenumkomitato de SAT**

La plej pozitiva estas la maturiĝo de la Esperanta kinarto, kiu esprimiĝis per la okazigo de la internacia festivalo *Kino sen limoj* en San-Paŭlo. SAT kontribuis al ĝi per antaŭpremiera disponigo de la dokumenta filmo *Esperanto* de Dominiko Gaŭtiero, produktita de ĝia eldona fako kooperativa. Aliaj menciindaĵoj estas la publikigo, en la retpaĝoj de SAT, de la raportoj el Japanio de Hori Jasuo post la katastrofo en Fukuŝimo, kiuj utilis kiel rekta fonto por naci-lingva informado, kaj la partopreno de esperantistoj kaj SAT-anoj el diversaj landoj en la indignula movado. SAT mem rekte kontribuis per reta disponigo de la traduko de la furora verko de Stefano Hessel *Indignu!*

La plej negativaj estis la akcidenta forbrulo de parto de la sonmaterialo kaj diskostokoj de *Vinilkosmo*, kaj la kutima sed ĉiam malfacile kompansebla malapero de aktivuloj pro morto aŭ pro gravaj sanproblemoj.

**Elena Zhang**

**Ĉinio**

**Redaktoro de *El Popola Ĉinio***

La 20an de majo 2011 okazis kunveno de 60-jariĝo de Ĉina Esperanto-Ligo, kun la temo "Marŝi kun espero". Sinjoroj Li Shijun, Xie Yuming kaj Li Sen kaj sinjorino Tan Xiuzhu estis premiitaj per Premio por la Tutviva Atingo en la ĉina Esperanto-movado. Sinjoroj Li Shijun kaj Xie Yuming ambaŭ estas tre bonaj tradukistoj de Esperanto. Ili jam tradukis la kvar monumentajn klasikajn romanojn de Ĉinio. Sinjorino Tan kune kun siaj stabanoj servigis Esperanton al internacia kultura interŝanĝo, al reformado kaj pordo-malfermo de Ĉinio; sinjoro Li Sen eldonis multajn Esperanto-librojn por lokaj esperantistoj per sia propra mono kaj daŭre klopodas plenenergie por Esperanto-movado de internaciaj fervojistoj. Decembre sukcese okazis la 9a Ĉina Kongreso de Esperanto.



**Giorgio Silfer**

**Eŭropo**

**Verkisto, instruisto kaj organiza konsilisto, konsulo de la Esperanta Civito (2007-2011)**

En 2011, pro personaj konatoj, multaj en Esperantio sentis kaj doloron kaj feliĉon. Grandan doloron donis, ekzemple, la forpaso de Leen Deij, mentoro kaj dojeno de la Esperanta Civito. Kaj grandan ĝojon donis, ekzemple, la resaniĝo de Halina Gorecka, unu el la motoroj de *Sezonoj*.

Negativa estis la senkompata atakado kontraŭ Stano Marček, al kiu Osmo Buller eĉ atribuis la ĉefan respondecon pro la membrokrizo de UEA, en la unua mesaĝo kiun li rajtis fari post la reveno oficejen, kun la rekomendo de la kuracisto fari nur tion kio plaĉas al li... Sed negativa estis ankaŭ la defenda insistado pri Stano Marček, kvazaŭ li estus martiro de ia persekuto. Fakte la problemo situas trans la (efektiva aŭ supozata) mediokreco de redaktoro Marček: la problemo estas la finvenkisma malkapablo interrilati kun la personoj — se ne homame, almenaŭ humure.

Pozitiva estis la definitiva foriro de Jakvo Schram el SAT. Tamen negativa la fakto, ke ĝi okazis tro malfrue por savi tiun asocion.

Kompreneble mi ne silentas pri la sukcesa ekspansio de la Esperanta Civito, sed pri tio eblas legi en lastatempa intervjuo en LOdE. Al ĝi necesas aldoni la demokratian disvolviĝon de la ĵusaj elektoj por la Senato, el kiuj fontas tre pozitiva novaĵo: la nova Konsulo estas virino, Marie-France Conde Rey. Nek la Akademio de Esperanto, nek UEA, nek SAT ĝis nun havis prezidantinojn.

**Humphrey Tonkin**

**Usono**

**Eksprezidanto de UEA**

Ne malfacilas identigi la plej grandan atingon de la jaro. Temas pri la registro de la centmila membro de Lernu.net. Petro Baláž kaj liaj kolegoj prave komprenis antaŭ kelkaj jaroj, ke la reto estos la ĉefa kanalo por la lernado de Esperanto, kaj ke ĝi rapide fariĝos la plej aktiva socia areno por gejunuloj. Tiel ili sekurigis la estontecon de nia lingvo. Sed ili ne solas: ankaŭ per edukado.net oni efike uzas la reton por plibonigi la nivelon de Esperanto-instruado kaj krei novan entuziasmon por Esperanto-instruado. Kaj la instruista asocio ILEI ĉiam pli kaj pli efike agadas sur paralela trako, donante pozitivan impulson per bona organizado kaj bona respondemo al bezonoj.

Fiaskoj? Ili certe okazis, sed plejparte tuj malaperis en obskuron. Pli ĝenerale mi diru, ke mi estas daŭre ĝenata de tiu speco de esperantisto, kiu ŝajne envenis la movadon ĉefe por akuzi la aliajn esperantistojn pri jenaj kaj jenaj mankoj. Ni ankoraŭ elspezas multe tro da energio en tiuj internaj bataloj. Aliflanke, granda parto de la movado ŝajne restas en sia rutino kaj ne volas, aŭ ne kapablas, pensi originale kaj novige. Ili memorigas min pri la fama difino de frenezeco: ripeti la saman aferon fojon post fojo kaj esperi pri alia rezulto.



**Ne forgesu (re)aboni**

**Cindy McKee**

**Usono**

**reviziisto de La Karavelo kaj respondeculo de verkoj.com**

Kiel iu, kiu sidas ekster la kutima fizika medio de Esperantujo, mia vidpunkto nepre estas iom aparta.

La plej okulfrapa sukceso, laŭ mi, estas la sukceso de lernu.net. La mejloŝtono de 100 000 registritaj uzantoj ĉe lernu.net estas solida pruvo ke diversaj homoj opinias Esperanton interesa kaj lerninda lingvo.

Fiaskado: Mi ne povas fingromontri al unu konkreta okazo, sed la tendenco “spami”, t. e., trudmesaĝi kiel propaganda maniero, estas hontinda. Ekzemplo estas la Tutmonda Twittertago, en kiu Esperantistoj uzu la servon Twitter por sendi kiel eble plej multajn mesaĝojn pri Esperanto. (Ho, mi ĵus sukcesis fingromontri.)



**José Antonio Vergara**

**Ĉilio**

**ISAE-aktivilo**

Laŭ perspektivo kiun mi agnoskas esti komplete subjektiva, mi taksas pozitive:

- ke lernu.net trapasis la centmil-membran sojlon;
  - la okazigon de la Unua Esperanta Kinofestivalo;
  - la iniciaton por Esperanto-Insulo en Hajnano;
  - la ILEI-Simpozion pri la lingva aspekto de la sciencaj komunikado kaj edukado, en la Universitato de Kopenhago;
  - ke nova, vigla estraro de ISAE glate transprenas la valoregan agadon de d-ro Rüdiger Sachs;
  - ke denove okazis kunigo de kelkaj landaj aŭ mondopartaj kongresoj, kiel la korea-japana aŭ la brazila kun la tutamerika TAKE, ĉar simbolo signifa kaj Esperante (= hominterlige) efika;
  - ke oni elektis d-ron Detlev Blanke Honora Membro de UEA, ĉar mi forte admiras lin kiel homon, movadan gvidinton kaj rigoran fakulon pri Esperantaj studoj kaj interlingvistiko;
  - ke Halina Gorecka kaj ŝia familio ricevis konkretan solidaron el Esperantujo... kaj novan renon.
- Mi bedaŭras la malkreskon de la UEA-membraro.



**Renato Corsetti**

**Italio**

**Prezidanto de Itala Esperanto-federacio**

La plej negativa estas la daŭra manko de konkretaj iniciatoj ĉe UEA por reigi ĝin la centro de la movado. Eble estas nur mi, kiu serĉas centron, kiun la movado ne plu bezonas. Aliflanke ankaŭ la aliaj “centretoj” ekzistantaj fartas same malbone kaj same malmulte interesiĝas pri la “laboro de Zamenhof”, alivorte la plivastigo de la nombro de Esperanto-parolantoj. Tamen estus bele, se ekzistus centro por helpi la laborantojn por Esperanto.

La plej pozitiva estas la aranĝo de la kurso en la Esperanto-insulo en suda Ĉinujo, kio montras ankaŭ fizike kiel la ebleco movadi estas moviĝantaj al aliaj mondopartoj.



**Hori Jasuo**

**Japanio**

**Eksprezidanto de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado, eldonisto**

Tri sukcesoj:

1. La komuna kongreso inter Japanio kaj Koreio. La unuan fojon en nia historio Japana Kongreso kaj Korea Kongreso okazis en Koreio, samperiode kaj samloke kaj samenhave. Ĝi estis granda sukceso tre memorinda por la movado en Azio.

2. Hori Jasuo daŭre sendadas raportojn pri la japana katastrofo de 2011, kiuj estas ankaŭ en lia libro *Tertrema Katastrofo de Japanio 2011 Taglibro*. Ĉi tiu raportado montras plian utilecon de Esperanto, kiun oni antaŭe ne ofte rimarkis.

3. La libro *Esperanto-esearo de mondvojaĝanto s-ro Hori* aperis en la japana lingvo en oktobro. Post unu monato la tuta eldonkvanto (350 ekz.) elĉerpiĝis, kaj tuj sekvis la dua preso. Ĉi tiu libro montras, kiel utila estas Esperanto, kaj kiom multe oni povas riĉigi sian vivon per Esperanto.



## **Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2011**

**PROPONANTOJ:** **Marija Beloŝević** (HR): vicprezidantino de IKUE; **Viŝnja Branković** (IT): direktoro de *Orbis Pictus*; **Renato Corsetti** (IT): prezidanto de IEF; **István Ertl** (LU): tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo; **Judit Felszeghy** (HU): ekssekretario de la Ea PEN-Centro; **Edmund Grimley Evans** (GB): eksprezidanto de EAB; **Maritza Gutiérrez González** (CU): estro de la E-redakcio de Radio Havano; **Dafydd ab Iago** (BE): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU; **Aleksander Korŝenkov** (RU): ĵurnalisto kaj verkisto; **Lee Jung-kee** (KR): direktoro de Seula E-Kulturcentro; **Vinko Markovo** (FR): ĝenerala sekretario de SAT; **Bruno Masala** (FR): komitatano de IKUE; **Cindy Mc Kee** (US): reviziisto de *La Karavelo* kaj respondeculo de verkoj.com; **Valentin Melnikov** (RU): poeto, ĵurnalisto, tradukanto; **Barbara Pietrzak** (PL): radioĵurnalisto, redaktoro; **José Antonio Vergara** (CL): prezidanto de ISAE.

**ELEKTANTOJ:** **Petr Chrdle** (CZ): direktoro de KAVA-PECH; **Agneta Emanuelsson** (SE): prezidanto de ILEI-SE, senatano de la Ea Civito; **Anna Jausions** (FR): prezidantino de OSIEK; **Gbeglo Koffi** (TG): administranto de la Afrika Centro E-ista; **Ilona Koutny** (PL): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM; **Liu Haitao** (CN): profesoro pri (inter)lingvistiko; **Stano Marček** (SK): redaktoro de *Esperanto*; **Tahira Masako** (JP): estraranino de JEI, kunlaboranto de KAEM; **Geraldo Mattos** (BR): doktoro pri lingvistiko; **Stefan Maul** (DE): eksĉefredaktoro de *Monato*; **Sergio Pokrovskij** (RU): sciencisto, tradukanto, eseisto; **Anna Ritamäki-Sjöstrand** (FI): eksprezidanto de EAF; **Roland Rotsaert** (BE): kasisto de IKEF; redaktoro de *Monato* pri ekonomio; **Martin Schäffer** (MX/DE): komitatano de UEA, sekretario de GEA; **Josef Shemer** (IL): sekretario kaj estrarano de ELI; **Ljubomir Trifončovski** (BG): verkisto, redaktoro.

**SEKRETARIO:** **Halina Gorecka** (RU): eldonanto de *La Ondo de Esperanto*.





Kuko kaj vino en la naskiĝtago de Zamenhof (Fotis Joanna Filipowicz-Choroszuca)

## La naskiĝtago naskiĝurbe

La naskiĝtagon de la iniciatinto de Esperanto niaj samideanoj kutimas celebri tre diverse — per prelego kaj prezento, per tago de Esperanto-literaturo, per amika rondo kun kuko kaj vino... En Bjalistoko ni penis ĉiujn ĉi ideojn kunigi proponante de la 9a ĝis la 11a de decembro Bjalistokajn Zamenhof-Tagojn.

La 12a eldono de la festo okazis en agrabla etoso kun partopreno de kelkdek da poloj el pluraj urboj, gastoj el Italio, Germanio, Belorusio, Moldavio kaj Latvio. Ĝi komenciĝis vendrede vespere en la Centro Ludoviko Zamenhof per prelego de Stanisław Dobrowolski kiu resumis la historion de la Bjalistoka Esperanto-Societo (en decembro — ekzakte 20-jara). Sekvis literatura parto: direktoro de la regiona biblioteko, inkluzive de la Bjalistoka Esperanto-libraro, enmanigis premiojn en nia 2a konkurso de prozo. Oni prezentis novajn librojn inter kiuj estis dulingva eldono de *Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano* de Jakobo Ŝapiro. Al muzika vojaĝo tra malnova, multnacia Bjalistoko invitis la klezmera bando *Hanajki*, prezentante premiere la teatraĵon *Rivke kaj ŝiaj songoj*.

Sabate okazis prelegoj (Zsófia Pataki pri la hungara movado, Tomasz Chmielik pri la Esperantaj bibliotekoj, Stanisław Mandrak pri Esperanto en polico) kaj spektaklo de infanoj lernantaj Esperanton en sia infanĝardeno. Ĉiuj neesperantistoj povis pruvi sian scion pri la verda movado en eta kvizo. La posttagmezo estis tradicia: kiel de multaj jaroj oni solenis ĉe la monumento de Zamenhof kaj okazis romkatolika meso en Esperanto. Poste estis plurlingva

koncerto de gejunuloj el la ensemblo *Young Folk Crew*, kiu — sincere — depost la pasintjaraj prezentaĵoj elstare progresis je voĉkantado. Amuza estis prezento de havajaj dancoj fare de grupo en kiu ludas kelkaj esperantistinoj. Ni prezentis du ekspoziciojn (Esperantaj poŝtaĵoj de Stanisław Mandrak kaj humuraĵoj de Pavel Rak). La vesperon finis naskiĝtaga festokuko kaj la spektaklo *Roma Triptiko* de artistoj el Nowy Sącz. Ĉiuj, kiuj restis dimanĉe, povis partopreni ekskurson tra la regiono.

Kiaj mi trovas la lastajn Zamenhof-Tagojn? Kiel ĉiam tre gajaj kaj relative sukcesaj. Mi ĝuas amikan etoson kaj vidas poioman sukceson de la loka movado. Se vi deziras kontribui en ĉi festo, viziti — eble eĉ por la unua fojo — la urbon de Ludoviko, ni elkore invitas. Ĝis la sekva jaro!

**Przemysław Wierzbowski**

Bydgoszcz: Helena Biskup prezentas la monodramon *Doktoro Esperanto* (Fotis Johano Skonieczka)



Eventoj

## Zamenhof omaĝata en Ĉinio

(ĈIIC) 10 dec okazis en la sidejo de la Xi'an-a Esperanto-Asocio kunsido por festi la 152-an naskiĝtagon de Zamenhof. Li Li, vicprezidanto de la asocio, faris raporton pri Zamenhof kaj pri evoluo de la Xi'an-a E-Asocio. Yuan Yongming faris raporton pri laboroj de la asocio en 2011. Aliaj aktivuloj diskutis pri religio, Esperanto-movado, komerco, kaj instruado. Post la kunsido la ĉeestantoj kune vespermanĝis kaj teste deziris, ke Esperanto havu bonan perspektivon en la venonta jaro.

17 dec Esperanto-Asocio de la Scienc-Teknika Universitato de Interna Mongolio en la urbo Baotou okazigis Zamenhof-Tagon por studentoj kaj esperantistoj. Chen Ping rakontis pri Zamenhof. Liu Baoguo, gvidanto de Esperanto-kursoj en la universitato, prelegis pri la uzado de Esperanto, kaj Chen Deen rakontis pri Esperanto-renkontiĝoj. Studentoj prezentis amuzajn programerojn. Vespere oni bankedis kaj kantis ĉine, Esperante kaj angle.

## 125 diplomoj el Bydgoszcz

En Bydgoszcz 10–18 dec 2011 okazis Zamenhofaj Tagoj, la 40a Studadsejo de AIS/AKB kaj Internacia Pedagogia Kurso. La ĉefgvidanto estis d-ro Przemysław Paweł Grzybowski, kiu surbaze de sia nova lernolibro *Ankaŭ vi estas Fremdulo* gvidis 3 AIS-kursojn pri Interkultura edukado en la mondo.

Okazis ankaŭ Seminario bakalaŭramagistra de AIS sub gvido de Prof. d-ro hab. Aleksandra Kowalczyk, kurso pri diplomatio de Prof. d-ro hab. Adam Sudol, direktoro de Muzeo de Diplomatiko en Bydgoszcz, kaj pliaj kursoj.

En la Internacia Studumo de Turismo kaj Kulturo (ISTK) oni inaŭguris la celebradon de la 125a jubileo de Esperanto. La klubo *Amiko* okazigis Zamenhofan Vesperon en Bydgoszcz kun monodramo pri Ludoviko Zamenhof plenumo de aktorino Helena Biskup.

15 dec 2011 okaze de la 152a naskiĝdatreveno de Zamenhof, la Estraro de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo dankis per 125 diplomoj okaze de la 125a jubileo de Esperanto, kiujn ricevis 75 eksterlandaj kaj 50 polaj Ege Gravaj Esperantistoj, kiuj helpas al disvolvo de la internacia Esperanto-edukado, kulturo kaj turismo. Fine de la Zamenhofaj Tagoj oni vizitis la urbojn Bydgoszcz, Toruń kaj Varsoviajn.

**Andrzej Grzybowski**

# LA ZAMENHOFA TAGO TRA LA MONDO

**Koreio.** 10 dec Korea E-Asocio (KEA) festis la 152an naskiĝdaton de Zamenhof en la hotelo *Commodore* en la urbo Pohang. En la festado partoprenis 43 esperantistoj kaj ĉirkaŭ 50 amikoj de Park Wha-Chong, la prezidanto de KEA.

Sub la prezido de Park Yongsung (vicprezidanto de KEA) la festo komenciĝis per la himno *La Espero*. Sekvis meditado pri d-ro Zamenhof kaj pri la pioniroj de Esperanto-movado. D-ro Park Wha-Chong salutparolis. Min Hyeonkyeong (ĝenerala sekretario de KEA) prezentis personan historion de d-ro Zamenhof. Ma Young-tae (prezidanto de lingva komitato de KEA) prelegis pri la temo “Zamenhof, la granda majstro de homaro” kaj gvidis kvizon pri Esperanto-vortoj.

En la dua parto de la festo, kiu kombinis la 152an Zamenhofan naskiĝon kaj la 60an naskiĝdaton de d-ro Park Wha-Chong, oni ĝuis luksan vespermanĝon. D-ro Park Wha-Chong regalis la partoprenantojn per diversaj vinoj kaj viskio. En la festeno ludis la koruso de Pohang-YMCA, Pohanga virina koruso kaj Pohanga orkestro. Oni kune kantis Esperantajn kaj koreajn tradiciajn kantojn. Ĝis profunda nokto oni muzikis, dancis kaj babilis reciprokante bondezirojn pri Esperanto-movado. (Kim Uson)

**Japanio.** 11 dec okazis la 19a Zamenhofa Vespere en Edo-Tokia Muzeo organizita de ok Esperanto-Grupoj de Tokio. Sinsekvaj buntaj programeroj: rakontoj pri esperantistaj kongresoj, prelego “Efikoj de radioj al homa sano” (Kiryu Yasuo), “Prezento de nova lernomaterialo” (Hukuda Makoto, Inumaru Fumio), “Pri novaj libroj” (Kogane Mariko), “Peĉakuĉo” (Saliĥ Zakirov) k.a. (Landa Agado)

**Irano.** 15 dec okazis Zamenhof-festo en la oficejo de Irana Esperanto-Asocio, en kiu estas loko nur por 20 personoj. Tamen la etoso estis varma kiel antaŭe. Okazis prelegoj kaj bankedo. (Landa Agado)

**Tajvano.** 4 dec en la kongresejo de Pingbe-a Komunuma Universitato en Pingtung pli ol 40 homoj, inter ili estis ok gastoj el Koreio, partoprenis la Zamenhofan Feston. Post la enkonduko de Kevin Shih pri Esperanto, oni kune kantis, aŭskultis du prelegojn, faris aerobikan dancon, trinkis teon, spektis libroekspozicion. La koreaj gastoj prezentis sian programon prelegan kaj artan. (Abengo)



Zamenhof-Tago en Koreio (Fotis Park Jong Yeong)

**Germanio.** La tradicia Zamenhof-festo, okazinta 10 dec en la Esperantourbo Herzberg, allogis 40 partoprenantojn, inkluzive de lernejoj kiuj lernas Esperanton. La bonetosa jarfina kunveno en la restoracio *Harzklause* enhavis rakonton pri la dumjaraj eventoj, prezentadon de novaj libroj, disdonadon de diplomoj, rakonton el la *Biblio*, komunan kantadon sub la gvido de Otto Kern, kaj alvenon de du anĝelinoj kaj Sankta Nikolao, kiuj disdonis donacojn. (ICH)

**Litovio.** Cento da esperantistoj el Litovio kaj Latvio kunvenis 10–11 dec en Kaŭno okaze de la Zamenhofaj Tagoj, kies programon konsistigis la 47a Kongreso de Litova Esperanto-Asocio kun raporto de la asocia prezidanto Povilas Jegorovas kaj diskutoj, gratulado de 12 jubileuloj de la jaro 2011, senpaga tagmanĝo por ĉiuj, rakontoj pri okazintaj kaj okazontaj kongresoj kaj renkontiĝoj, prelego pri Zamenhof kaj Litovio de Vilius Šidlauskas, festa koncerto. Junularo organizis sian vesperan kunvenon aparte. (*Barelo*)

**Armenio.** En Erevano 16 dec okazis Zamenhofa festa vespermanĝo de esperantistoj kaj iliaj gastoj — universitataj lingvistoj, muzikistoj kaj aliaj oficistoj. La ses-jara Ara bele salutis la partoprenantojn en Esperanto. Pri Zamenhof rakontis la Honora prezidanto de AEU Kamarnik Gevorkjan. Ni rememoris la akademianon kaj esperantiston Gurgen Sevak. Susanna Gevorkjan organizis teatraĵeton. Kelkaj gastoj esprimis deziron lerni Esperanton. (Susanna Baghdasarjan)

**D.R. Kongo.** 12 Kinŝasaj geesperantistoj 18 dec iris per buso al Lukala, por ĝui Zamenhofan tagon en la urbo, en kiu naskiĝis la E-movado en Kongo. Kune levinte niajn pensojn al la Majstro Zamenhof, ni poste kune laboris kaj fine koktelis, en la plej ŝatinda rendevuejo de Lukala *Ça va se savoir*. (Landa Agado)

**Sud-Afriko.** En Kaburbo la Zamenhofa Tago estis festita 16 dec kun ĉ. tri-dek neesperantistaj gastoj. Post bonvenigo kaj deklamado, Emile Malanda prelegis pri Zamenhof. Sekvis okaza ekspozicio kaj koktelo kun E-muziko. Fine oni ekskursis, admirante la belecon de Kaburbo. (Emile Malanda)

**Danlando.** En Kopenhago la Zamenhofa festo okazis 10 dec kun riĉa programo: kuna tagmanĝo, skajpa komunikado kun pluraj eksterlandaj esperantistoj, kvizo, muzikado kaj spektado de la filmo *The Universal Language* de Sam Green. Ĉeestis 30 personoj. (Landa Agado)

**Aŭstrio.** 10 dec en la Pola Instituto de Vieno, kun ĉeesto de gastoj el Ĉeĥio kaj Slovakio, okazis la Zamenhofa Festo. La prezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio Bernhard Tuder bonvenigis la ĉeestantojn. Prof-ino Katalin Fetés prelegis kun lumbildoj pri Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy okaze de la 120a datreveno de la naskiĝtagoj kaj 100a datreveno de ilia esperantistiĝo. Katarína Nosková el Slovakio prelegis pri novaj planoj kaj projektoj de Edukado@Interreto (E@I). Post la prelegoj iris la partoprenantoj al bufedo por manĝi kaj babili. (Leopold Patek)



## Novjara Renkontiĝo nun dekjara

Dekjariĝis la Novjara Renkontiĝo — fine de 2002 ĝi komenciĝis per kvintaga kunveno de 49 homoj en Fürstenberg norde de Berlino; inter tiuj estis deko da infanoj. Jam tiam infanoj gravis dum NR — intertempe ili havas sian propran regnon. Granda teamo zorgas pri ili, amuzas ilin kaj mem amuziĝas. Kaj la gepatroj kaj iliaj amikoj povas ĝoji pri unu semajno, dum kiu la infanoj havas ludkunulojn de mateno ĝis vespero; ofte dum NR-oj mi vidis mian propran filinon dum nur kelkaj minutoj tage.

NR kreiĝis, ĉar en Germanio mankis jarfina Esperanto-renkontiĝo por la generacio inter 30 kaj 50 jaroj. Ili estis tro maljunaj por IS, kiu tiam estis plenplena kun pli ol 300 partoprenantoj. Kaj multaj ne tro emis iri al IF, kiu disiĝis de IS komence de la 1980aj jaroj kaj sekve jam havis pli altan mezan aĝon. Krome ankaŭ IF estis granda renkontiĝo kun ĉ. 200 homoj kaj la organizanto HDP klare diris, ke li ne volas plian kreskon. Do indus organizi plian renkontiĝon.

La dua NR okazis en Tecklenburg apud Münster, proksime al Nederlando kaj Belgio; estis tutsemajna aranĝo, venis 60 homoj kaj la unuan fojon venis Christoph Frank, kiu ekde tiam estas kunorganizanto: li zorgas pri la infana programo, prezentas spektaklojn kaj okupiĝas pri la aranĝo de aliaj prezentoj. Aliaj kunorganizantoj dum la jaroj estis Gabi Schnell (tiam: Rothe), Julika Rosenstock, mia filino Iris kaj ekde tri jaroj Betti Maul-Propadović kaj Nicky Janssen. Ne penseble, kia estus NR sen ili, grandan dankon!

La tria NR okazis en Marienburg, sur

monto kun bela rigardo al la rivero Mozelo. Venis jam 153 homoj, kio prezentis organizan defion, ĉar la ejo mem havis nur 105 litojn... En la postaj jaroj ni novjare festis dufoje en Frankfurt kaj en Saarbrücken kaj po unufoje en Trier kaj en Föckinghausen (oriente de Dortmund). Estis inter 150 kaj 195 partoprenantoj, kutime ĉirkaŭ 60 infanoj kaj junuloj, el kiuj la duono estas denaskuloj.

Post la kuniĝo de IS kaj AS al JES, kiu okazas en Pollando aŭ apud Pollando en Germanio, kreiĝis Novjara Internacia Semajno, programo por junuloj inter 14 kaj 35 jaroj ĉe la okcidenta limo de Germanio. Ĝi logas ĉefe junulojn ĝis 20 jaroj.

Pasintjarfine 177 homoj el 15 landoj kunvenis en Bitburg apud Trier — ĉefe el Belgio, Germanio kaj Francio, iom el Nederlando kaj Svislando, la aliaj el deko da aliaj eŭropaj landoj kaj el foraj Siberio, Kanado kaj Malio.

Ĉi-foje la 10a Novjara Renkontiĝo, organizata de la asocio EsperantoLand, estis la plej granda jarfina Esperanto-renkontiĝo.

La porinfanan programon “Tempo kaj maŝino”, zorge preparitan de Christoph Frank, Nicky Janssen kaj Betti Maul-Propadović multe helpata de siaj tri filinoj, povis ĝui sesdeko da infanoj kaj junuloj. Ili kantis aŭ manlaboris, partoprenis en pupteatro aŭ la filmkreada “Holivudeto”, konstruis elektromotoron aŭ aŭteton kaj partoprenis en la ludoposttagmezo “La tempomaŝino”. La pli aĝaj junuloj povis partopreni kadre de la porjunula programo, la 3a Novjara Internacia Semajno, ekzemple en geokaŝludoj, ĵonglado, filmprezentoj aŭ

ekskursoj kaj krome memstare organizis sian tempon per diversaj ludoj, muziko kaj interparolado. La 16-jarulino Klára Ertl prezentis interesan prelegon pri “Hormonoj, feliĉo kaj filozofio” ripetitan pro peto de la publiko.

La bona prizorgado de infanoj permesis al la gepatroj kaj aliaj plenkreskuloj ĝui sian propran programon. Eblis konatiĝi kun vasta gamo de temoj — de budajsmaj meditado kaj filozofio, sana manĝado, la ideo de salajro de vivo (baza enspezo por ĉiu), tra la estonteco de literaturo, la invento de nombroj, sorobana kalkulado, iksode portitaj malsanoj ĝis prezento de ŝparema aŭtomobilo, Burundo, Malto, enmigrado aŭ limoj por infanoj. Oni ofertis ankaŭ diversajn prelegojn rilate al la evoluigo de Esperantujo — la vortarprojekto ViVo, subtekstigo de filmoj, ĵurnalismo, varbado, politika agado, elita klubo, UEA kaj kiel kreskigi la nombron de infanlibroj en Esperanto (prezentiĝis la *Bildlibro de la Tero* kaj *Hirthara Petro*).

La Novjara Renkontiĝo proponis ankaŭ plurajn dancgrupojn — tango, liniodancoj, cirklodancoj, dancateliero de la muzikgrupo *Kapriol'* kaj polonezo; oni povis senstreĉiĝi per gimnastiko kaj eklerni aŭ majstriĝi en Go-ludo. Eblis ankaŭ kanti ĥore kaj kanti kanonojn, kion gvidis Saskia Idzerda kaj Jesper Jacobsen, jam dum multaj jaroj fidelaj kontribuantoj al la muzika programo de NR. Plian kanon-kantadon prezentis la grupo *Kapriol'*, kiu ĝuigis la gastojn ankaŭ per bela kaj multe ŝatata koncerto.

En aliaj vesperoj okazis interalie kvizo pri eŭro kaj Eŭropo, prezento de fabelo kaj kantoj de Viéra el Tuluzo, surpriza vespero okaze de la dekjariĝo de NR, ludoj kaj fine adiaŭa vespero kun kontribuoj de partoprenantoj. Kaj meze de la semajno, kompreneble, estis la Silvestra festo kun bongusta bufedo kaj dancado ĝis malfrua nokto. Christoph Frank — multjara kaj meritplena kunorganizanto kaj teatroprezentanto dum NR — dufoje bele prezentis sian teatran rakonton *Aleksandro kaj la mekanika muso*.

Kompreneble ne mankis kursoj por komencantoj, progresantoj, progresintoj kaj konversaciemuloj, kiujn gvidis Jean-Luc Kristos, Gunter Neue kaj Peter Weide. La vesperan senstreĉiĝon en la trinkejo spertoplene organizis Helmut Klünder kaj Gunter Neue. Kaj por kompreni la devenon de unu el la trinkaĵoj ni ekskursis al ekspoziciejo de la bierfarejo de Bitburg.

**Lu Wunsch-Rolshoven**  
EsperantoLand



La gaja jubilea NR (Fred Dreyer)



## JES: Impresoj de unuafojolino

De la 27a de decembro 2011 ĝis la 1a de januaro 2012 okazis la tria Junulara Esperanto-Semajno (JES) en la bela Pollanda urbo Gdańsk kun ĉirkaŭ 200 partoprenantoj. La bone elektita JESejo troviĝis en la urbocentro, kaj ĉiuj vidindaĵoj estis facile atingeblaj. La amasloĝejo kaj la manĝejo estis en la lernejo, kie okazis la taga programo, kaj la junulargastejo troviĝis en apuda strato. La koncertoj kaj la solena malfermo okazis en alia domo proksime al la JESejo, en sufiĉe granda salono, kie oni povis danci aŭ spekti la koncertojn sidante.

Ĉar ĝi estis mia unua novjara renkontiĝo, mi ĝuis ĉiun sekundon de ĝi, kaj mi tre ĝojis ke mi povas kunfesti kun tiel multaj esperantistoj. La programoj ĉiutage estis interesaj kaj koloraj. Miaj plej ŝatataj estis la prelego de *Muzaiko*, la urba ludo, la prezentado de la pola popoldancgrupo, kaj la ateliero de arta juvelaro. Krom tio okazis kurso por lokaj infanoj, programo por novuloj, diversaj prelegoj, trejnadoj de *Muzaiko*, esperantaj kursoj, ĵonglado, ekskursoj en la urbo, renkontiĝo kun la nobelpremiito Lech Wałęsa, ktp...

Ĉiuvespere okazis koncertoj en la koncertejo. Dum la unua vespero la litova *Asorti* dancigis la publikon, poste Gijom koncerencis (miksaĵo de koncerto kaj konferenco). Duanokte *Inicialoj DC*, Kimo kaj la Danĝera amuzis nin, kaj sekvontvespere Johannes kaj *La Perdita Generacio*. La plej kortuŝa momento de la aranĝo estis, kiam la bando petis la publikon, ke ĉiu brakumu iun, ni formis longajn brakumajn vicojn kaj kune kantis. Mi timas, ke neniu faris foton, ĉar ĉiu partoprenis en la granda brakumado.

Post la koncertoj la noktan programon ĉiu povis elekti el inter la diskejo, karaokeo, gufujo kaj drinkejo. Ni bone atingis la lastan tagon de la jaro kun ĝismatena kantado.

Mi tre dankas al ĉiuj organizantoj kaj partoprenantoj, kiuj donacis al mi la plej bonan renkontiĝon kaj novjaran balon. La plej interesa en ĉi tiu Silvestro por mi estis tio, ke ĉiu kulturo havis eblecon celebri laŭ sia propra metodo. Ni alvenis el diversaj tempozonoj kaj celebris la novjaron ankaŭ laŭ la tempozono de la aliaj partoprenantoj. Ankaŭ mi trovis la manieron, kiel celebri laŭ la hungara tradicio. Mi konigis en la anonctabulo kaj anoncigis per la DJ, ke



En JES Kim Henriksen koncertis kun sia filo kaj ties bando (Fotis Ivo Miesen)

post noktomezo ĉiu venu kanti la hungaran himnon al la ĉambro, kie mi jam antaŭe skribis la tekston surtabulen. Post la noktomezo ni kune kantis nian himnon ĉirkaŭ 20-ope.

**Zsófia Pataki**

## La 28a IF en Xanten

La jarfina Internacia Festivalo enhavas altkvalitan programon kaj riĉan originalan Esperanto-kulturon el pluraj landoj de la mondo. Dumtage ni ĝuas seriozajn prelegojn kaj la vesperaj programoj estas pli distraj.

Al la ĉi-jara 28a IF, okazinta ekde la 27a de decembro 2011 ĝis la 3a de januaro 2012 en Xanten, aliĝis 121 gesperantistoj el 17 landoj. La plej foraj venis el Japanio, Brazilo, Israelo, Ruslando. Inter la ĉeestantoj ne mankis la germana ambasadoro en Ruslando kun sia edzino.

La programo komenciĝis per interkona vespero kun multaj amuzaj programeroj. En la unua tago estis pritraktita la kadra temo *Benelukso*, kiu komenciĝis per forumo lerte prezentita de Claude Nourmont kaj Kristin Tytgat. Poste ĉiutage eblis elekti inter pluraj programeroj. Al la plej interesaj apartenas vojaĝprelegoj. Ĉi-foje ni spektis bildojn de Tanzanio, Namibio, Laoso, Armenio, Indonezio. Ne malpli interesa estis prezento kaj scienca klarigo de Amri Wandel pri “Novaj planedoj kaj sunsistemoj”.

Pri la tradicia sporta evento en Nijmegen informis Rob Keetlaer; pri la japana tertremo, cunamo kaj ties postsekvoj prezentis filmojn gesinjoroj Huĝimoto. De Ziko van Dijk ni eksciis pri la historio de enciklopedioj kaj fono de Vikipedio. Ni akiris informojn pri

Esperantaj retoj, pri la armena skribo, pri korea ginsengo, pri alta sango-premo kaj kolesterolo.

Eblis mediti, gimnastiki, danci kaj partopreni en atelieroj pri prilaborado de steatito (sapŝtono) kaj farado de bidoj por sinplibeligo dum la silvestra vespero. Okazis Esperanto-kursoj, aŭtoraj horoj, estis prezentitaj novaj libroj, admiron vekis ekspozicio pri fabelaj mondoj kaj interesaj bildfabeloj prezentitaj de Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko el Ruslando.

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare okazis jam la 5a Internacia Vintra Universitato, en kiu multaj partoprenantoj ekzameniĝis kaj ricevis diplomojn.

En la semajno ni ĝuis rusan, nederlandan, israelan kaj internacian vesperojn. Plaĉan gitarkoncerton kaj brilan prezentadon de la teatraĵo *Ludoviko* prezentis Georgo Handzlik. Post ĉiuj vesperaj programeroj ni translokiĝis al la jam fama “Knajpo”, kie ni interbabilis kaj ĝuis bonan etoson ĝis malfruj horoj.

Ne mankis la tradiciaj Silvestra bufedo kaj balo inaŭgurita per polonezo. Sekvis plurfoja festado de Nova Jaro laŭ diversaj horzonoj. Novjara promeno laŭ la lago refreŝigis la partoprenantojn.

Du duontagaj ekskursoj celis promennon en la urbo Xanten kaj en la apuda arkeologia parko. La tuttagan ekskurson gvidis Kees Ruig al la proksima Nederlanda urbo Nijmegen, kie ni piede promenis kaj poste navigis ŝipe sur rivero Waal. Bongustis la patkukoj manĝitaj surloke.

La festivalo estis bone organizita de nia ŝatata HDP (Hans-Dieter Platz) kaj ni ĝoje atendas la venontan festivalon ĉi-jarfine en Dortmund.

**Liba Gabalda**



## Dibenitan Kristnaskon!

Ankaŭ ĉi-foje, la 25an de decembro post la tradicia Kristnaska mesaĝo en la placo Sankta Petro, Papo Benedikto la 16a diris bondezirojn en pli ol 60 lingvoj. Post la maoria kaj samao kaj antaŭ la gvarania kaj latina (la lasta) la Papo bondeziris en Esperanto: “Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!”

Samkiel dum la antaŭaj benoj “Urbi et Orbi”, Kristnaske kaj Paske, grupo de esperantistoj ĉeestis en la placo Sankta Petro kun alte levitaj paneloj kiuj konsistigas la vorton “Esperanto”. La iniciato estis gvidata, kiel tradicie, de la itala samideano Giovanni Conti.

Antaŭ la apero de la Papo en la centra loĝio de la Baziliko, la itala televido montris frontlinie la panelojn kun “Esperanto”, kaj la raportisto de la itala elsendo diris: “Unu el la lingvoj, kiujn la Papo uzos por diri siajn bondezirojn estos Esperanto, kiu estas la lingvo...” Poste li ŝanĝis temon por anonci la aperon de la Papo.

La Esperanto-panelojn oni remontris dum la elsendo plurfoje, aparte dum la Esperant-lingva saluto de la Papo.

Laŭ <http://www.ikue.org/>

## Laborgrupo por la jubileo 125

Per sia mesaĝo je la ĵusa Zamenhof-tago la prezidanto de UEA, prof. d-ro Probal Dasgupta, malfermis la jubilean jaron de la 125-jariĝo de Esperanto. Lige kun tio la Estraro de UEA nomumis Laborgrupon por la 125-a jubileo de Esperanto kiu klopodas kunplekti kunlaborantojn el ĉiu parto de la Esperantokomunumo. Kiel ĝia kunordiganto estis elektita Renato Corsetti. Pri la agado “Kurso 125” respondecas Stefan McGill, prezidanto de ILEI. La preparojn por la informa agado lige al la Esperanto-tago en 2012, la 26a de julio, gvidos Brian Barker. La jubilean agadon en Afriko kunordigos Adjé Adjévi el Togolando kaj tiun en Azio Lee Jung-kee el Korea Respubliko. **GK UEA**

## IJK migras alilanden

TEJO tre bedaŭras la anoncon ke ĉi-jare la 68a Internacia Junulara Kongreso ne okazos en Japanio. Pro organizaj malfacilaĵoj la Loka Kongresa Komitato devis rezigni pri organizado de la kongreso. Kelkaj ŝanĝoj de la ejo, de la organiza teamo kaj manko de volontuloj por helpi kunorganizi, estas validaj kialoj pro kiuj TEJO devis akcepti la rezignon.

Post trisemajna necerteco, kaŭzita de la subita rezigno de Japana Esperanto-Junularo, la Estraro de TEJO akceptis decidon pri la loko de ĉi-jara IJK. La Estraro konsideris nur proponojn el Azio, kiuj venis el Ĉinio kaj Vjetnamio.

La kongreso okazos en Hanojo, la ĉefurbo de Vjetnamio — same kiel la 97a Universala Kongreso. La kongresinvitanto estas Vjetnama Esperantista Junulara Organizo.

Tina Tišljär, la estrarano de TEJO pri kongresoj, klarigas:

“...la vjetnama propono estas tre konkreta kaj bone preparita, kune kun elektita ejo kaj provizora programo. La teamo spertas pri IJK, ĉar parte temas pri samaj homoj, kiuj organizis la kongreson en 2007. Ne malgravas ankaŭ tio, ke vjetnamianoj jam estas laborantaj por la Universala Kongreso. Ĉiuj ĉi faktoroj certigas nin, ke sep monatojn antaŭ la evento ni povas sekure pensi pri okazigo de IJK en Vjetnamio”.

Decidita estas ankaŭ la loko de la kongreso de TEJO en 2013. Kandidatiĝis tri landoj: Germanio, Israelo kaj Meksiko. El ili la Estraro de TEJO elektis la kandidatiĝon de Junulara Esperantista Ligo de Israelo. La kongreso okazos en la nordo de Israelo kun la ĉeftemo: “Reciklado — ĉu nova vivmaniero? ĉu nova religio?”

Laŭ <http://tejo.org>

Kompreneble ankaŭ multaj viroj voĉdonis por la nova Konsulino, Marie-France Conde Rey (en la foto ĉe balotejo).



## La Civito kun nova Konsulo

La 15an de decembro okazis elektoj al la Senato de la Esperanta Civito.

Voĉoj esprimitaj entute . . . . . 193  
Voĉoj validaj . . . . . 186  
Sindetenoj . . . . . 9  
Por la Ruĝa Listo. . . . . 23 (12,99%)  
Por la Verda Listo . . . . . 130 (73,44%)  
Por la Blanka Listo . . . . . 24 (13,55%)  
Voĉoj laŭ la kandidatoj (preferoj):

**Ruĝa Listo: Rooke 22, Zavadlav 19, Agbolo 9, Byelongo 8, Nuñez Hernández 8, Bamberski 6, Liu 6, Negrete 6, Papazov 3, Shrestha 0.**

**Verda Listo: Silfer 87, Conde Rey 79, Trifončovski 51, Mbazumutima 49, Nimubona 47, Zelazny 23, Herrero 17, Emanuelsson 15, Nájera 14, Cattaneo 12, Nguefack 10, Waseka 10, Karibe 10, Hammarberg 9, Batila 8, Hiltbrand 6, Penacchio 5, Henry 3, Grisafi 1.**

**Blanka Listo: Bartek 12, Rogora 9, Amstad 7, Birindwa 7, Mihalkov 3, Thomas 3, Nawrocki 2.**

(Grase estas markitaj la senatanoj.)

Proporcio estas asignitaj 9 senatanoj al la Verda Listo, 2 al la Blanka kaj 2 al la Ruĝa. Aldoniĝas 6 pro la balotpremio al la gajninta listo. Praktike la Verda grupo havas unu senatanon malpli ol en la antaŭa mandato, la Ruĝa unu plian, la Blanka estas egala.

En la Senato sidos 13 rezidantoj en Eŭropo, 4 en Afriko, 1 en Ameriko kaj 1 en Azio (dum la antaŭa mandato estis 18 en Eŭropo kaj 1 en Afriko).

La Konsulo por la mandato 2012–2016 estos Marie-France Conde Rey, la Vickonsulo estos Ljubomir Trifončovski.

“Estas triumfo de la demokratio”, — komentarias la nova Konsulino, Marie-France Conde Rey, kiu aparte ĝojas pro la sukceso de la afrikaj gecivitanoj.

“Mi tute ne miras pro la kresko de la afrika Civitanaro, ĉar la intelekta nivelo kaj la politika preparo de la afrika esperantistaro estas ĝenerale pli altaj ol tiuj de la okcidenteŭropa”, — opinias la eliranta Konsulo Giorgio Silfer, kiu estis la plej voĉita en absoluto, pli ol la ĉefkandidatoj de sia listo mem. Pruvo, ke li estas la plej populara en la Esperanta Civito.

Laŭ komuna decido de la eliranta Konsulo kaj de la eniranta Konsulino, la inaŭgura sesio de la Parlamento (Forumo kaj Senato) estas kunvokita al Ĝenevo por la 16a de aprilo 2012.

**HeKo**



## Kongreso en la Popola Ĉinio

(ĈIIC) 24–25 dec en Hefei de la provinco Anhui okazis la 9a Ĉina Kongreso de Esperanto kun la temo “Malfermi novan paĝon de la ĉina Esperantomovado, surbaze de Azio kaj vizaĝe al la mondo”. La kongreso estis organizita de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj gastigita de la Anhui-a Esperanto-Asocio, Hefei-a Federacio de Soci-sciencaj Rondoĵoj, kaj subtenita de la Hefei-a Urba Biblioteko, Hefei-a Administrada Komitato de Ekonomia kaj Teknologio-Disvolva Zono kaj Anhui-a Turisma Asocio.

Antaŭ la inaŭguro ĉiujn impresis la video pri la 60-jara historio de ĈEL per paroloj de veteranaj kaj junaj esperantistoj kaj ankaŭ koncernaj gvidantoj subtenantaj Esperanto-movadon.

La malferman ceremonion prezidis Yu Tao, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de ĈEL. Chen Haosu, eksprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj prezidanto de ĈEL, en la inaŭguro faris gravan paroladon. Li diris, interalie:

“Dank’ al Esperanto, ni renkontiĝas ĉi tie. Jam antaŭ pli ol cent jaroj, d-ro L.L. Zamenhof, kreinto de nia kara lingvo Esperanto, montris, ke Esperanto estas nur projekto de la internacia komuna lingvo liverita de li al la homaro, ĝi postulas disvolviĝon kaj perfektigon laŭ la evoluo de la epoko. Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ simbolo de bela idealo de la homaro...”

kaj alvokis la kongresanojn:

“... unuflanke heredi de la maljunaj esperantistoj sinoferan spiriton, kaj aliflanke krei novan vojon por nia laboro, sin ĵeti per niaj kunfanditaj entuziasmo kaj aferoj en la konstruadon de la granda disvolvo kaj prosperigo de la socialisma kulturo kaj fari kontribuon por starigi bonan figuron de Ĉinio en la internacia komunumo.”

Guo Xiaoyong, konstanta vicprezidanto de la Ĉina Internacia Eldona Grupo kaj vicprezidanto de ĈEL, diris en sia saluta parolado, ke ĉinaj esperantistoj devas plifortigi eksterlandan disvastigon de la ĉina kulturo per Esperanto. Esperanto perfektigis dank’ al vastaj interŝanĝoj inter malsamaj kulturoj. Esperantigo de literaturaj klasikaĵoj, kiuj reflektas fruktojn de la homara civilizacio, pruvas ĝian aplikeblecon.

Wang Ruixiang, vicĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris laborraporton de ĈEL por la jaro 2011.

Dum la kongreso ĉ. 200 kongresanoj



Guo Xiaoyong alvokis disvastigi la ĉinan kulturon per Esperanto (Foto de EPC)

el diversaj lokoj de Ĉinio, kaj gastoj el Hispano kaj Koreio, diskutis pri la kongresa temo, pri la laborraporto de ĈEL kaj pri starigo de komisiono de Esperanto-instruado. Dum la kongreso okazis fakkunsidoj pri Esperanto-instruado, medicino, komerco kaj tiu de prezidantoj kaj ĝeneralaj sekretarioj de lokaj Esperanto-asocioj. Donis al ĉeestantoj Esperanto-lecionon hispana samideano Augusto Casquero. *El Popola Ĉinio* organizis kunsidon de siaj ret-legantoj.

En la kongreso estis premiitaj avangardaj Esperanto-organizoj, grupoj kaj personoj por la jaro 2011. Vespere kongresanoj rigardis artajn programerojn prezentitajn de la Hefei-a Arta Grupo.

25 dec fermiĝis la kongreso kun sukceso. Chen Shi, estro kaj ĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio* kaj vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris parolon en la fermo. Ŝi diris:

“Ni devas servi per Esperanto al la granda disvolvo kaj prosperigo de la socialismaj kulturaj aferoj, strebi por krei novan markon de la Esperantomovado kaj klopodi por disvastigi influon de la ĉina Esperantomovado al la socio kaj plenforte kulturi ĉiopovajn talentulojn kaj plialtigi konkurencon kapablon de junaj esperantistoj”.

Ankaŭ Ling Bo, prezidanto de la Anhui-a Esperanto-Asocio kaj estro de la Hefei-a Urba Biblioteko, konigis Esperantomovadon en Anhui-provinco kaj esprimis sian esperon pri Esperantomovado en la venontaj jaroj. Rezentantoj de ĉiuj fakkunsidoj respektive parolis en la fermo pri la rezulto de la diskutoj.

Amaskomunikiloj raportis pri la kongreso.

Zhang Xiaotong

## ĈLEI: Por pli efika instruado

(ĈIIC) 25 dec 2011 kadre de la 9a Ĉina Kongreso de Esperanto okazis kunsido de la Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ĈLEI), en kiu partoprenis pli ol 50 personoj. S-ino Gong Xiaofeng, prezidantino de ĈLEI, prezidis la kunsidon, kiu estis la unua kunsido de ĈLEI post ĝia fondiĝo en jarnezo.

Gong Xiaofeng dividis la laborojn de la estraranoj kaj elmetis la laborplanon. Laŭ la plano ĈLEI okazigos siajn seminariojn paralele kun lokaj kongresoj. Ĝi daŭre organizos la trejnadojn en vintra kaj somera ferioj kaj helpos al universitatoj malfermi Esperanto-kursojn. Por efike altigi la lingvonivelon kaj reguligi la Esperanto-instruadon en la lando, ĈLEI starigos ekzamenan sistemon de Ĉinio, kiu konsultos la ekzamenan sistemon de ILEI konsiderante la ĉinan realon. S-ino Gong emfazis la reguligon de lerniloj. Ŝi diris, ke nun al ĉinaj mezlernejoj mankas Esperanto-lernolibroj, ĈLEI faros laboron en tiu flanko.

ĈLEI helpos al universitatoj kaj lernejoj starigi ĝemelajn lernejojn pri Esperanto por doni al ili pli da ŝancoj uzi la lingvon. En la diskutado multaj ĉeestantoj prezentis la Esperanto-instruadon de siaj lokoj. La kunsido decidis, ke ĈLEI regule redaktos kaj dissendos sian bultenon al la membroj por interŝanĝi Esperanto-instruajn informojn ĉinajn kaj internaciajn.

Nun la Esperanto-instruado viglas en Ĉinio. En la universitatoj de Nanchang, Wuhan, Liaoning, Pekino kaj mezlernejoj kaj elementaj lernejoj en Zhenjiang, Changzhou, Taiyuan kaj aliloke funkcias Esperanto-kursoj, kiuj konstante kulturigas novajn esperantistojn kaj ludas tre gravan rolon en la Esperantomovado.

Chen Ji

S-ino Chen Shi (maldekstre), vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj direktoro kaj cefredaktoro de *El Popola Ĉinio*, kaj s-ino Gong Xiaofeng, prezidantino de ĈLEI, en la kunsido. (Foto de EPC)



## Unufraze

★ Kadre de la projekto poliglotti4.eu de la Eŭropa platformo por promocio multlingvismon, en kiu membras EEU, en Madrido okazis renkontiĝo de civilsociaj organizoj kun interesgrupoj de EU, en kiu 1 dec 2011 la prezidanto de EEU Seán Ó Riain prezentis la programon “Springboard to Languages”. (*Eŭropa Bulteno*)

★ En la Filozofia fakultato de Zagrebodanke al prof. d-ro Velimir Piškorec en la lernojaro 2011/12 estas du interlingvistikaj studobjektoj: “Planlingvoj” por la germana fako (germanlingve) kaj “Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto” por la studentoj, kiuj ne studas la germanan. (*Tempo*)

★ Dorota Mczka ekde oktobro 2011 fondis scienca studentan E-rondon ĉe la Ŝtata Supera Lernejo en Biała Podlaska, Pollando. (Maria Majerczak)

★ Pli ol 50 studentoj partoprenis la fonda kunvenon de la Shandong-a E-Junulara Organizo ĉe la Zaozhuang-a Universitato. (Semio)

★ La organizo “Infanoj Ĉirkaŭ Afriko” (Benino) okazigis en 2011 E-kursojn en lernejoj de Ayahohoué, Azové kaj Hondjin, seminarion por altigo de lingvonivelo por 30 gelnantoj, legokonkurso, k starigis E-korespondadon kun alilandaj klasoj kadre de la projekto Mondo-Rondo. (IĈA)

★ Tri instruistoj instruas Eon oficiale en la lernejo Complexe Scolaire la Merveille en Kinŝaso, la ĉefurbo de D.R. Kongo. (DKEA)

★ La libro *Komerca konversacio en Esperanto* de Zhang Tiezheng, eldonita danke al la prezidanto de la Klubo de Ĉinaj E-Komercistoj Wang Tianyi, estis prezentita 25 dec 2011 kadre de la 9a Ĉina Kongreso de Eo, en la fakunsido pri komerco kaj turismo, kiun ĉeestis ŝtatoficistoj, entreprenistoj kaj komercistoj el pluraj provincoj de Ĉinio. (ĈIIC)

★ La sekretario de EEU Zlatko Tišljarnome de EEU sendis protest-leteron al la Pollanda ministro por eksteraj aferoj Radosław Sikorski, kiu 28 nov 2011 en Berlino asertis, ke Britio donis al la Eŭropa Unio komunan lingvon. (*Eŭropa Bulteno*)

★ 15 jan 2012 en la jarkunsido de la Pekina E-Asocio (PEA), Nan Youli, veterana e-isto kaj eksa parolanto de Ĉina Radio Internacia, reelektiĝis kiel prezidanto de PEA; lin helpas kvar vicprezidantoj: Wang Ruixiang, Wang Yanjing, Zhao Jianping kaj Zhou Liüi. (ĈIIC)

## Kiom da esperantistoj en Ruslando?

Laŭ la rezulto de la censo je la 14a de oktobro 2011 la nombro de la konstanta Ruslanda loĝantaro estis 142,9 milionoj da homoj. La censo havas multajn ĉapitrojn, sed ni vidu nur la lingvan.

4,5 milionoj da respondintoj ne indikis la lingvosociojn, inter la ceteraj la rusan lingvon menciis 137,5 milionoj da homoj. Vidu la plej sciatajn lingvojn:

1. Rusa . . . . . 137,5 (99,4%)
2. Angla . . . . . 7,57 (5,48%)
3. Tataro . . . . . 4,28 (3,09%)
4. Germana . . . . . 2,07 (1,50%)
5. Ĉeĉena . . . . . 1,35 (0,98%)
6. Baŝkira . . . . . 1,15 (0,83%)
7. Ukraina . . . . . 1,13 (0,82%)
8. Ĉuvaŝa . . . . . 1,04 (0,75%)
9. Avara . . . . . 0,72 (0,52%)
10. Armena . . . . . 0,66 (0,48%)

Esperanton indikis nur 992 personoj. Ĝi estas en la 120a loko inter la lingvoj gunziba (1012) kaj teleuta (975). Inter la kvin elekteblaj planlingvoj krom Esperanto (992) estas nur Ido kun 9 personoj kaj Edo kun nur 1 sciinto. Slovio kaj Intelingua ne estis menciitaj. Do, averaĝe unu ruslandano inter ĉ. 150 mil scias Esperanton, aŭ inter unu miliono da ruslandanoj estas 7 esperantistoj.

Ni komparu kun alilandaj censoj:

En 2001 en Hungario 4 mil 565 personoj indikis Esperanton. Ĝi estas en la 18a loko en la lingvolisto kun averaĝe 445 esperantoparolantoj por unu miliono da hungarianoj.

La censo en Litovio (2001) montris 844 personojn, kiuj scias Esperanton, kiu estas en la 16a loko en la lingvolisto kun averaĝe 245 esperantoparolantoj por unu miliono da litovianoj.

En 2006 la Novzelanda censo evidencigis 123 esperantoparolantojn, aŭ ĉ. 30 por unu miliono da novzelandanoj. Esperanto en Novzelando estas, same kiel en Ruslando, en la 120a loko en la lingvolisto. **AIKO**

Douglas Draper, Siri Bartusch, Bengt Nordlöf antaŭ la enirejo de la Esperanto-domo en Lesjöfors (*Fotis Wim Posthuma*)



## LF: Unuafoje en Jalto

27 nov 2011 la E-klubo *Tero* (Jalto, Ukrainio) okazigis la unuan Lingvan Festivalon en sia urbo. En Jalto estas multaj naciaj societoj, kie ni trovis prezentantojn de la lingvoj armena, greka, belorusa, germana, pola, krimea-tataro, hebrea, jida. Kelkajn prezentantojn proponis la Krimea Humanisma Universitato, kie la festivalo okazis, kaj la societo “Lingvist” (franca, itala, portugala, araba, japana, ĉina), aliajn ni trovis mem (estona, okcidentaj dialektoj de ukraina, hinda, Esperanto kaj du elfaj lingvoj), — entute 19. La rusan, ukrainan kaj anglan ni decidis ne prezenti, ĉar ili estas sufiĉe konataj.

Estas konate, ke en 1913 komisiono, gvidita de Tristan Bertrand, okazigis konkurson, kiun partoprenis po du tradukistoj de pluraj lingvoj. Unu el la tradukistoj elfrancis tekston al sia lingvo, la dua tradukis reen al la franca. Venkis Esperanto. Ni ripetis la eksperimenton.

La konkurson partoprenis tradukistoj de la franca, angla, germana, japana kaj Esperanto. Estis du tekstetoj. Mi tradukis al Esperanto, kaj Pavel Mojajev retradukis mian tradukon en la rusan. La konkurson juĝis kompetenta lingvista jurio. La Esperanta traduko evidentiĝis la plej proksima al originalo, nekompareble pli bona ol aliaj tradukoj.

En paŭzo inter la prezentadoj okazis duonhora koncerto de Pavel Mojajev en la rusa, angla kaj Esperanto. Post la festivalo artikoloj pri ĝi aperis en multaj ĵurnaloj kaj estis televida prezento.

**Jefim Zajdman**

## Vintra Renkontiĝo en Lesjöfors

Fine de la unua semajno de januaro renkontiĝis en la granda Esperantodomo en Lesjöfors (meze de suda Svedio) ties estraro kaj ceteraj aktivuloj, por diskuti kaj plani la agadon de tiu kursejo/gastejo.

En ĉi-jara plano estas someraj kursoj en julio, KER-ekzamenoj en junio kaj komuna praktika laboro en la domo. Oni konsideras petskribi al EU pri rimedoj por Nordia projekto, eble kompara studo de la lingva situacio en la Nordiaj landoj sub la kreskanta premo de la angla.

La domo servas ankaŭ kiel “migrula hejmo” kaj akceptas neesperantistajn gastojn. Dum oni januare diskutis Esperante endome, grupo de junaj svedaj gastoj esploris per-skie la najbarajn arbarojn.

**Douglas Draper**



# Mi ege fieras esti esperantisto

*Intervjuo kun Dennis Keefe,  
la Esperantisto de la Jaro 2011*

**Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?**

Kiam mi eksciis, ke mi iĝis la Esperantisto de la Jaro, mi kortuŝiĝis kaj pensis pri mia familio, fakte. Pri mia iam kvinjara filo, Nikolo, kun kiu mi ludadis korbopilkon en Esperanto, kaj pri mia iam sesjara filino, Maria-Helena, kiu ĉiam faris siajn BEK-ekzercojn, ĉar ĉe la fino mi donis al ŝi peceton da ĉokolado. Mi pensis pri la familio, ĉar kvankam ili bone akceptis mian esperantistecon, ili pensis, ke mi estis eble tro idealista, kaj ke mi devis koncentriĝi pli pri mia kariero ĉe la komerca lernejo HEC en Parizo. La konkreta anonco pri tiu premio ne estis, tamen, tute surpriza. Ekaperis antaŭsignoj: homoj kiuj mesaĝe diris, ke ili proponis min por enlistiĝo; demandoj pri tio aŭ alio por enmeto en artikolon de *La Ondo de Esperanto*, ktp. Tamen mi pensis, ke ĉio ĉi estis rutino por ĉiuj enlistanoj, mi ne tiumomente kredis, ke homoj plejparte voĉdonos al mi por tia premio.

**Vi estas internacie konata kiel la inventinto de la Lingvaj Festivaloj. Bonvolu rakonti.**

Mi kreis Lingvajn Festivalojn en la urbo Tours de Francujo en la jaro 1995. Jam en la unua jaro prezentiĝis 32 lingvoj en mallongaj kursetoj de 40 minutoj. En la posta jaro estis 65 lingvoj, kaj en la tria jaro estis 85 lingvoj kun proksimume 250 kursetoj. La reago de la amaskomunikiloj estis profunda, speciale ĉe radio kaj televido. En la tria jaro estis multaj eble ĝis 15 radiaj kaj televidaj programeroj pri la Lingva Festivalo, inkluzive almenaŭ du tutlandajn televiderojn. Eble ne miloj sed milionoj da homoj aŭdis pri Esperanto pro tiuj festivaloj.

Mi lanĉis Lingvajn Festivalojn en Usono kaj Ĉinujo kun similaj rezultoj. Mia ununura festivalo en Usono, ĉe la Universitato de Ilinojso, 65 lingvoj kun 150 kursetoj, estis vaste komentita de la

loka televido kaj gazetaro. En Ĉinujo, la Universitato de Nankino akceptis mian planon por starigi Lingvan Festivalon kiel eventon en la Internacia Jaro de Lingvoj de Unesko, kaj laŭ la raporto de Unesko pri tiu jaro, verŝajne la Nankina Festivalo estis la plej ampleksa prezentado de lingvoj en la tuta mondo tiujare: 67 lingvoj, 256 kursetoj kaj pli ol 13 mil 500 ĉeestantoj en la kursetoj. La kurso de Esperanto ĉeestiĝis de ĉirkaŭ 1450 homoj, kaj el ili 225 ĉeestis postajn kursojn de Esperanto. Rekordo, almenaŭ en Ĉinujo. La gazetara reago, kiu ofte prezentis Esperanton estas simile vasta: naŭ ĵurnalaj artikoloj kaj kvin televidaj programeroj. La Ĉina internacia novaĝ-agentejo *Xinhua* ankaŭ disvastigis raportojn kaj fotojn internacien.

La populara akcepto de Lingvaj Festivaloj, la potenco favore prezenti Esperanton al neesperantistoj indikas, ke la Festivaloj povas okupi fortan strategian rolon en la disvastigo de Esperanto. Laŭ mi, Lingva Festivalo estas ideala projekto por ĉiuj Universalaj Kongresoj, kaj mi kaj Gian Carlo Fighiera prezentis ĝin tiel ĉe UEA en Roterdamo antaŭ multe da jaroj, sed ĝis nun, kvankam kun forta aprobo de José Antonio Vergara, la ideo ne sukcese survojiĝas. Bedaŭrinde, ĉar Lingva Festivalo, kun Esperanto kiel sponsoro, indikas, ke Esperanto estas la amiko de ĉiuj lingvoj. Kaj Lingva Festivalo estas **konkreta** monstro al la publiko, ne filozofaj vortoj kiuj perdiĝas sur la papero de filozofa verkisteto.

**Nekredebla laboro! Kaj ĝi ne estas la sola, pro kiu vi iĝis la "heroo de la jaro" en Esperantujo. La internacia elektokomisiono aparte emfazis vian instruadon, interalie, en Ĉinio.**

Mi estas unu el la multaj homoj kiuj dum tre longa tempo provadis instrui Esperanton. Mi kursogvidis en, unue, Hispanio, poste Francujo, Usono, Japanio kaj nun Ĉinujo. Kelkaj lokoj estas konataj: Liceo de Esperanto en Madrido,



Grésillon kaj Plouezek en Francujo, NASK en San-Francisko kaj Oomoto en Japanio. Aliaj lokoj estas malpli konataj, kiaj iu kaŝita monaĥejo Duobao Si en Ĉinujo aŭ kursoj en la urbeto Lunay en Francujo. Lastjare en Ĉinujo mi instruis Esperanton pli ol 300 horojn, kaj triono estis en oficialaj programoj ĉe la universitato.

**Vi ja instruas Esperanton en tute aparta maniero. Bonvolu rakonti pri tio.**

La ĉefa trajto de miaj kursoj estas, ke ili estas tre netradiciaj. Ekzemple, la daŭro de mia vintra, feria kurso en Ĉinujo estas pli ol 200 horoj. Kelkaj el miaj kursoj estas tre intensaj, ĝis ok horoj ĉiutage. Mi ne instruas la sufiksojn kaj prefiksojn, sed lasas la lernadon de ili por hejmstudado per mia libro NESPO. Mi tute ne komencas la instruadon per prononcado, kaj fakte ne instruas la prononcadon rekte. Eble la plej netradicia parto de mia kurso estas, ke mi instruas ege malmulte, kaj lasas ĝis 90% de la tuta tempo por praktikado en malgrandaj grupetoj, sen instruisto. Mi kreis du kursojn: BEK kaj PEPAS, kaj unu metodon: la Valencian Metodon. Iom post iom mi enretigas ĉiujn miajn Esperanto-ekzercojn ĉe [www.bekkurso.info](http://www.bekkurso.info). Nun tie troviĝas eble 500 paĝoj da materialo. Sed mi devas konfesi al vi, ke mi ankoraŭ ne bone komprenas kiel fari bonan *kompletan* kurson, nek mallongan kurson.

La problemoj eble kuŝiĝas en la paradokso de lingvolernado: facile oni povas priskribi la gramatikon de Esperanto, eĉ al ĉinoj, tamen krei fluajn parolantojn kiuj bone memoras kaj utiligas la vortojn, tio estas alia afero.

### **Kaj kio estas la Esperanto-Insulo?**

Esperanto-Insulo estas nova projekto kiun mi skizis por la ĉinaj esperantistoj antaŭ preskaŭ du jaroj, kiam mi instruis Esperanton sur la insulo Hai Nan Dao, aŭ Hajnano. Mi verkis raporton rekomdante, ke la loka asocio tie kaj la ĉinaj esperantistoj starigu servo-centron por aziaj kaj eŭropaj esperantistoj. Tion ilin nun volas fari, kaj inter la 12a de januaro kaj la 13a de februaro 2012 ekestiĝos la unua internacia Esperanto-Insulo, kun pli ol 110 gelnantoj el eble 24 landoj. Detala informo pri Esperanto-Insulo troviĝas ĉe [www.esperanto-insulo.info](http://www.esperanto-insulo.info).

**La Esperanto-Insula programo evoluos paralele laŭ tri direktoj: BEK-kurso por komencantoj, metodika seminario por instruistoj, kaj Universitato de Esperanto. Kio ĝi estas?.. Ĉu io simila al AIS?**

Ne tiel simila al AIS, mi sekvas grandparte la modelon de la Universitato de Berkeley kaj de Yale. Mi nun klopodas starigi la Universitaton de Esperanto kune kun profesoroj Ron Glossop kaj Federico Gobbo. Tiu projekto tre diferencias de tiu de AIS pro multaj kialoj. Unue, la kursoj estas nur tiuj kursoj, kiuj jam instruiĝis en normalaj universitatoj.

Due, ĉiu kurso daŭras 40 horojn proksimume. Trie, la kursoj estas bazaj kaj sufiĉe ĝeneralaj por ke ĉiuj normalaj universitatoj povu ĉeesti ilin. La kursoj estos filmitaj kaj estos videblaj en la Interreto, kaj poste estos ĉies propraĵo laŭ la principoj de Kreiva Komunumo. La unuaj kursoj okazos en Esperanto-Insulo, sed ili estas sendependaj de tiu insulo, kaj venontece povas okazi ie ajn. Mi fakte, ne bone komprenas la modelon de AIS. Kiel dirite, la modelo Universitato de Esperanto pli baziĝas sur la modelo de la Universitato de Yale kies kursoj videblas ĉe [oyc.yale.edu](http://oyc.yale.edu). Rigardu ĉe Yale kiaj estas la kursoj, kaj vi bone kaj rapide komprenos, kiaj, mi kredas, povas esti la kursoj de la Universitato de Esperanto.

**Ĉu vi ricevas helpon de Esperanto-asocioj, edukejoj kaj klerigejoj por realigo de viaj projektoj?**

Jes kaj ne. Jes, en la senco, ke multe da esperantistoj helpis al mi starigi projektojn diversloke: la lokaj asocioj de Madrido kaj de Valencio en Hispanujo permesis al mi starigi eksperimentajn kursojn kaj de tiaj kursoj naskiĝis BEK. El la ok homoj kiuj kunlaboris por estri la unuan Lingvan Festivalon en Tours, sep estis esperantistoj. Esperanto-Insulo

estas nur mia ideo plibonigi la ideojn de la ĉinoj, ekzemple Arko, Trigo kaj Trezoro, fari efikajn, internaciajn, vintrajn kursojn, enĉinuje nomataj VEK. La Universitato de Esperanto estas klopodo popularigi la kompleksajn ideojn de AIS, do la ideo mem devenas de Helmar Frank kaj aliaj esperantistoj. Ekster Esperantujo estis la forta apogo de la Universitato de Nankino en Ĉinujo, kaj la helpo de la Universitato de Ilinojso en Usono.

Sed, ĝis nun mi mem, plejparte el mia propra poŝo financis la starigon de BEK, de la Lingvaj Festivaloj, de la Esperanto-Insulo kaj de la Universitato de Esperanto. Sed diri tion ne estas diri, ke mi forte finance apogis tiujn agadojn. Tute ne. Ĉiuj el tiuj agadoj starigeblas aŭ sen mono aŭ preskaŭ tute sen mono. Tiuj projektoj ne bezonas monon. Punkto. La grandaj Lingvaj Festivaloj de Francujo kaj de Usono kostis al mi eble 300 eŭrojn entute, kaj pensu ke tiuj tri jaroj de Festivaloj estigis eble ĝis 6 televidajn programerojn, du el ili tutlandaj, kaj eble 15 radiajn programerojn, kaj kelkaj el ili regione kaj tutlande. En la lasta Lingva Festivalo de Ĉinujo estis pli ol 250 instruantoj kaj 400 kursetoj, kaj ĉiuj instruis tiujn kursojn volontule (la kosto mem de la starigo estas ege malalta, tamen la Universitato utiligis multe da mono por reklami pri ĝi). Por BEK, mi devas pagi eble 30 eŭrojn ĉiujare por havi mian retejon [www.bekkurso.info](http://www.bekkurso.info). Estas neniam subvencio por la Esperanto-Insulo kaj la Universitato de Esperanto. La ŝlosilo estas trovi senpagajn klasĉambrojn, kaj fari agadojn kiuj ege interesas al la partoprenantoj kaj volontuloj. Piednote, post kiam mi forlasis Francujon en 1997, kaj poste la lokanoj estris la Lingvan Festivalon tie, ili komencis ricevi grandajn subvenciojn de la loka registaro (iom ĉar TF1 kaj la bone konata ĵurnalisto Claire Chazal famigis la trian Lingvan Festivalon de 1997). Subite estis du Festivaloj ĉiujare kun subvencioj de miloj da eŭroj (eble pli ol 20 mil en la unuaj jaroj). Mi tre bedaŭras tion, ĉar fakte, oni ne bezonas monon por starigi Lingvan Festivalon; oni ne bezonas luksaĉojn. Sed tion ĝis nun multe da homoj ne bone komprenas.

**Sed vi ja okupiĝas ne nur pri Esperanto-projektoj...**

Mia profesia vivo inkluzivas laboron kiel estro de produktado ĉe fabriko, merkaticisto kaj vendisto ĉe IBM, estro de multaj universitataj programoj en Usono, Francujo kaj nun Ĉinujo. Mia

### **Dennis Keefe ricevis la diplomon**



La 11an de januaro en Hajnano (Ĉinio) okazis la oficiala malfermo de la kursaro, organizita kadre de la projekto Esperanto-Insulo. Al la tutmonata programo aliĝis 110 personoj el 23 landoj.

La ĉefa kursaro de la komencantoj estas gvidata de Dennis Keefe, laŭ lia fama BEK-metodo kaj observata kaj helpata de trideko da partoprenantoj de la pedagogia seminario, kiun Katalin Kováts gvidos. Unu el la ĉefaj taskoj de la kursaro pri metodiko estas ĝuste lerni multon pri tiu ĉi metodo kaj aktive helpi kaj dumkurse kaj eksterklase al la novlernintoj praktiki la lingvon kaj havi komunikadspertojn.

Krom la komencantoj, la aliaj ĉeestantoj havas la eblon frekventi tiujn kursojn aŭ elekti unu el la universitataj kursoj: “Alfronti militon” de Ronald Glossop (Usono), kaj “Filozofio kaj historio de informatiko” de Federico Gobbo (Italio).

Dum la malferma ceremonio, matene la 11an de januaro oni laŭtleĝis la gratulmesaĝojn, inter ili tiujn de Stefan MaGill, Renato Corsetti kaj de la estroj de la landaj sekcioj de ILEI el Germanio, Svislando, Koreio.

Fine de la malfermo, surprize por la lanĉinto de la ideo Esperanto-Insulo, estis anoncita grava novaĵo. Katalin Kováts, kiel kuriero de *La Ondo de Esperanto*, transdonis la diplomon al la novelektita Esperantisto de la Jaro 2011, Dennis Keefe. Tio estis speciale interesa kaj simbola, ĉar Dennis Keefe ricevis sian distingon rekte el la manoj de sia antaŭulino, la Esperantisto de la Jaro 2010a, kaj kadre de ĝuste tiu aranĝo por kiu Dennis estis premiita. La kursaro funkcios ĝis la 12a de februaro.

**K. K.**



instrua laboro inkluzivis kursgvidadon ĉe la Universitato de Iliojso, École Polytechnique en Francujo, HEC ankaŭ en Francujo kaj konsiderata kiel la unuaranga komerca lernejo de Eŭropo (laŭ *Financial Times*). Mia specialaĵo estas instruado de merkato kaj strategio. Mi instruis la anglan lingvon ĉe Berlitz en Madrido antaŭ 30 jaroj. Mi havas du dujarajn magistrajn diplomojn: unu pri komerco, MBA, kaj unu pri lingvo-instruado, ambaŭ ĉe la Universitato de Iliojso. Kvankam mi neniam studis lingvojn antaŭ la aĝo de 25 jaroj, mi nun flue parolas kvin: la hispanan, la francan, la germanan, Esperanton kaj la anglan. Mi ankaŭ parolas kaj skribas ĉine, tamen nur ĉe tre baza nivelo.

Eble la plej granda honoro de mia vivo estas, ke mi gajnis la Konkurson pri Vortoj ĉe la Universitato de Arizono, kaj havas la rekordon por la 50 jaroj de la konkurso. Eble tiu rekordo ankoraŭ staras; mi ne scias. Eble vi jam divenis mian ŝatokupon: legi vortarojn!

**Legante la Esperantan gazeton kaj la ret-diskutojn, oni ofte miras pro la amatoreco de la esperantistaro kaj pro la tro malnovaj manieroj de lingvo-disvastigo, dum pluraj movadoj kaj sociaj grupoj sukcesis krei pri si pli pozitivajn imagojn ol la esperantistoj. Ĉu vi havas ideojn pri la kaŭzoj de la relativa stagnado de la esperantistaro?**

Vi ĵus tuŝis unu el miaj plej ŝatataj diskuttemoj en Esperantujo, kaj estas vasta listo de kialoj pro kiuj la Esperanto-Movado nuntempe stagnas, sed ne estas la kulpo de la esperantistoj mem. Unu el la ĉefaj obstakloj bone klariĝas de la teorio de Everett Rogers pri la Etendiĝo aŭ Difuzado de Novaj Ideoj (Ideo povas esti koncepto, industria varo, alt-teknologia kreaĵo, ktp.) Unu el la bazaj nocioj de tiu teorio estas, ke la homoj kiuj unue akceptas novan ideon malsimilas al aliaj homoj kiuj eventuale poste akceptos la saman ideon. Fakte, estas kvin grupoj aŭ segmentoj menciitaj de Rogers: la unua grupo, *novigantoj* (innovators), estas nur 2.5% el la socio, kaj por disvastigi novan ideon, unue oni devas konvinki tiun grupon. Posta grupo, *fruaj akceptantoj* (early adopters), reprezentas 13.5% el la socio, kaj la posta grupo, *frua plimulto* (early majority) inkluzivas 34%.

Ne estas spaco ĉi tie por bone klarigi, kiamaniere tiu sistemo funkcias, sed la ĉefa eraro de la esperantistoj, kaj mi mem faras tian eraron, estas ke ni util-



igas multe da tempo kaj inko por konvinki la vastan publikon pri la boneco de Esperanto, dum Rogers kaj ni scias, ke fakte, tiu plimulto neniam akceptos Esperanton se ili ne vidas, **unue**, homojn kiuj **jam** utiligas ĝin, kaj tiuj unuaj homoj apartenas al tiu unua malgranda grupo. Ni havas multe malpli da kapdoloroj se ni dediĉos nin al la varbado de nur tiuj *novigantoj* unue, kaj post kiam tiuj homoj akceptos kaj uzos Esperanton, ni povos transiri al aliaj celgrupoj.

**Kion vi pensas pri la projekto mem Esperantisto de la Jaro?**

Mi tre tre ĝojas ricevi tiun premion, ĉar mi pensas, ke Esperanto estas granda parto de mia vivo kaj mi ege fieras esti esperantisto. En ĉiuj el miaj kursoj ĉe la universitatoj en Francujo, Usono, kaj en Ĉinujo, mi ĉiam parolas volonte pri Esperanto al miaj studentoj. Tamen, mi ne pensas, ke mia ricevo de la premio helpas tiom al la Esperanto-Movado. Pli gravas aliaj individuoj kaj speciale motivigitaj teamoj. Mi ĝojas se ili sukcesas. Mia laboro estas sukcesigi ilin kaj iliajn ideojn. Mi ĝojas kiam ili povas fari tion kion ili volas. Bezonatas premioj por teama laboro, sed ke tiu teama laboro estu vere mezurable kaj utila kaj eble nova. Se mi donus premiojn, ne estus al homoj kiaj mi, sed al tiaj homoj. Mi ankaŭ kredas, ke la bonaj verkistoj de Esperanto bezonas pli da atento. Mi bedaŭras, ke mi ne talentas por esti verkisto, sed mi ĉiam kredas, ke la verkistoj estas ĉe la kerno de la eventuala sukceso de Esperanto.

**Ĉiu laŭreato respondas al du tradiciaj demandoj. Unue: kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenos al neloĝata insulo (ne al Hajnano)?**

Antaŭ ĉio, PIV aŭ NPIV. Ĉiam estas ĝuo legi tiun vortaron! Due, *Don Kihoto*. Plezuro. Kaj trie, mi kunprenos unu el la klasikaj libroj de Ĉinujo tradukita de Laulum. Mi jam legis la *Romanon de la Tri Regnoj*, kiu estas unu el la kvar grandaj ĉinaj klasikaj. Do eble mi prenu la libron *Ruĝdoma Sonĝo*, ĉar la rakonto lokiĝis en Nankino, kie mi nun loĝas.

**Due, pri viaj planoj, kompreneble, post la Esperanto-Insulo...**

Krom plimaturigi BEK, longdaŭrigi Esperanto-Insulon, oficialigi la Universitaton de Esperanto, kaj plidisvastigi Lingvajn Festivalojn, al mi plaĉus kunlabori kun projektoj por starigi novan virtualan Bibliotekon de Esperanto (kun *homoj* ĉe la kerno kaj estrado), krei mezurado-sistemon por Esperantaj agadoj, kaj krei veran dialogon pri strategio kaj Esperanto. Mi jam antaŭe de tempo al tempo menciis tiajn temojn en la retdiskuto-listoj kaj en *Libera Folio*, tamen tiaj mesaĝoj perdiĝas en amaso de komentoj pri lingvaj fenomenoj, kritikoj de aliaj esperantistoj kaj alispecaj *ekster-*temaj komentoj. Estas tre probable, ke la plejparto de la bonaj Esperantaj strategioj kuŝas nekonataj, sed malkovrindaj, kaj tiuj strategioj ne ekvideblas sen la kunlaboro kaj teama interkonsento de multaj esperantistoj kiuj *ne* pensas same aŭ eĉ simile. Kaj antaŭ ĉio, eksperimentoj en diversaj landoj gravas por starigi sukcesajn strategiojn. Mi mem ne scias kion fari, sed se aliaj eksperimentas, ni komencos lerni, kaj mia revo estus, ke la movadestroj de Esperanto permesos al la movadanoj iĝi parto de granda *lernanta organizo* (vidu tiurilate la verkadon de Peter Senge de la universitato MIT).

**Ke viaj planoj realiĝu!**



Eŭropo enmiksiĝas en la famili-nomojn de beboj (Fotis Dafydd ab Iago)

## Eŭropo ne volas malsamajn nomojn

### de Dafydd ab Iago

Esperanto estas ne nur lingvo sed ankaŭ komunumo. Esperantistiĝinte, pluraj el ni eĉ elektas novan nomon por uzo en la komunumo. Persone min, la internacia lingvo kaj agado en ties komunumo pensigis pri mia propra identeco kaj pri malegaleco de lingvoj, inkluzive de mia propra lingvo — la kimra.

Sed ĉu tio igis min, same kiel multajn el miaj samlandanoj, oficialigi la kimran formon de mia nomo, sed ne la anglan? Aŭ ĉu estas la konata “troigismo” de samlandanoj ekster siaj landoj? Same kiel la islanda nomsistemo, la kimra indikas la apartenon al familio per indiko de la patro kaj ne per la familio-nomo. Kion tio signifas praktike? La “familionomo” de mia filo ne estas la sama kiel la mia. Li nomiĝas ne “ab Iago” ĉar li ne estas filo de Iago, sed de mi, Dafydd. Sekve, li nomiĝas “ap Dafydd”.

Ankaŭ islandanoj havas similan sistemon. La islanda kantistino Björk Guðmundsdóttir estas bona ekzemplo. Ŝi estas filino (dóttir) de Guðmunds. Simile, Unnur Vilhjálmsdóttir, kiu gajnis la beleckonkurson “Miss World” en 2005, estas filino de Vilhjálms.

Malsamaj leĝoj pri familinomo koncernas ĉiam pli multajn homojn en Eŭropo. Pli kaj pli da eŭropanoj kaj homoj el la tuta mondo ne nur vivas en alia Eŭropa lando sed ankaŭ

edz(in)iĝas kun homoj el aliaj landoj. En la Eŭropa Unio la libera cirkulado de civitanoj estas reguligata per diversaj leĝoj, inkluzive de la rajto vivi kaj labori en alia EU-lando sen suferi diskriminacion.

Kompreneble, kiam estis skribataj la Eŭropaj traktatoj, ne estis menciita la rajto havi la saman nomon en diversaj landoj. Tamen la Eŭropa Kortumo en Luksemburgio dum la lastaj dek jaroj prijuĝis plurajn kazojn kaj konkludis, ke ŝtato diskriminacias se ĝi devigas homojn havi du malsamajn familinomojn.

Konsideru kazon de hispano kiu edziĝas kun belgino, sinjorino Dupont. La gefiloj de iu sinjoro Sanchez Lopez, por uzi oftan nomon, nomiĝus Sanchez Lopez en Belgio — se patro agnoskas siajn gefilojn ili aŭtomate kaj senescepte ricevas la familinomon de la patro. Sed en Hispanio ili nomiĝus Sanchez Dupont. Tio efektive signifas, ke la gefiloj havus du malsamajn familinomojn en du landoj de la Eŭropa Unio.

Belgio, kiel multaj landoj — ankaŭ Francio, Nederlando kaj Germanio — havas tre simplan sistemon, laŭ kiu la familinomo de la patro fariĝas, kvazaŭ aŭtomate, la familinomo de la infanoj. En aliaj landoj ekzistas pli da elekto, sed ankaŭ foje tre striktaj leĝoj.

Se nia sinjoro Sanchez Lopez edziniĝus kun sinjorino de slava lando kiel Pollando, Ĉeĥio, Slovakio kaj Bulgario, liaj filinoj normale devintus havi “inan” familinomon, kiu estas alia ol la familinomo de la filoj. Tio efektive signifas ke filinoj havas la finaĵon ~a, ~eva aŭ ~ova en siaj familinomoj.

Multe da landoj en la okcidenta Eŭropo ankoraŭ ne akceptas, ke gefiloj de la samaj gepatroj povas havi “malsamajn” familinomojn. Ili ankaŭ ne akceptas, ke gefiloj havas alian familinomon ol tiu de la patro.

Ĉu tio estas Eŭropa problemo? Certe jes, ĉar pli kaj pli da homoj vojaĝas kaj vivas en alia Eŭropa lando. Havi malsamajn familinomojn en diversaj pasportoj kun la sama foto eble ŝajnas amuza. Ni imagas James Bond kun librejo da pasportoj. Sed en ĉiutaga vivo havi du malsamajn familinomojn ofte signifas amason da burokrataj problemoj. Kiu volas pruvi sian identecon ĉiutage?

Pro tio la Eŭropa Komisiono esploras la ideon lanĉi juran proceduron kontraŭ Belgio kaj aliaj landoj, se ili ne tuj registras infanojn kun la nomoj kiujn ili portas (aŭ rajtas porti) en aliaj landoj. Se la Eŭropa Komisiono gajnos la kazon en la Eŭropa Kortumo, mi persone ĝojos. En mia kazo, tio signifas, ke nia dua infano ne havos du aŭ eĉ tri malsamajn familinomojn en tri landoj de la Eŭropa Unio.

## Ne ununura homo kulpas

Komence mi volas danki Vin pro Via nepre leginda kaj legenda gazeto, pliriĉiganta la Esperanto-mondon kaj servanta kiel bona varbilo por ekinterestitoj.

Mi ja scias, ke Esperantio ne estas monaĥejo plena de pacemuloj, sed leginte la rubrikon *Vortoj de Komitato Z* en la januara kajero, en kiu estis atakita la redaktoro de la gazeto *Esperanto*, mi serĉis la vorton “mobbing” en mia vortaro kaj ĉu “hato” jam estas oficiala.

Pri la multtavola problemaro de tiu ĉi temo mi certe ne havas novajn legindaĵojn — kio estas skribenda, jam estas skribita. Tamen mi nur povas miri: En bona entreprena agado oni ĉiam pripensas ne nur unu eron de produktado, sed planas kaj agas multflanke: celo de la produkto, rimedoj, normoj, teknika evoluo, deziroj de la uzantaro... neniuj serioza produktanto kredas, ke ununura homo kulpas pro ia problemoj.

Do ĉu tia persona atako kontraŭ sincera Esperantisto vere necesas, bonas, valoras je publico nun ankaŭ en *La Ondo*? Kritiko kiu celas la homon, sed

ne la laboraĵon? Militiro nur necesas, se malsanas la interrilatoj; mi ne povas kredi, ke UEA ne sukcesas disponigi sanajn rimedojn por solvi la demandon sen tiaj atakoj. Do mi, kiel simpla membro, devas konjekti, ke la plimulto silentas pro kontenteco kun la redaktoro aŭ pro la taksado, ke la vera kaŭzo de la membro-falo kaŝiĝas alie. Se nekontenta plimulto silentadas, ili ne meritas ian plibonigon.

Uwe Stecher





## Esperantistino vicprezidas parlamenton



(*Eŭropa Bulteno*) En la lastaj balotoj en Slovenio la 4an de decembro 2011 la konata esperantistino Ljudmila Novak estis elektita membro de Slovenia parlamento kaj fine de decembro ankaŭ vicprezidanto de la parlamento. Ljudmila Novak estas laŭprofesie instruistino de la germana kaj slovena lingvoj kaj literaturoj. Dum siaj gimnaziaj jaroj ŝi lernis Esperanton en Maribor kaj ankaŭ partoprenis en du TEJO-kongresoj.

Pri politiko ŝi komencis okupiĝi en 2000 en la partio Nova Slovenio. En 2001 ŝi estis elektita urbestro de urbeto Moravče proksime de Ljubljana kaj okaze de balotoj por Eŭropa Parlamento en 2004 ŝi estis elektita Eŭropa parlamentano. Kiam en 2008 ŝia partio malsukcesis en la Sloveniaj balotoj kaj ne plu havis parlamentanojn en la parlamento, la tiama prezidanto de Nova Slovenio rezignis pri la prezidanteco, kaj ŝi estis elektita prezidantino de la partio. De 2009 ŝi ne plu estis membro de Eŭropa Parlamento sed tre sukcese preparis sian partion por la novelektitoj kiuj okazis ĉi-jare kaj sukcesis ricevi pozicion en la Slovenia parlamento per 4,8% (4% estas minimumo por eniri la parlamenton), kio signifas ke ŝia partio nun en la 90-persona parlamento havas 4 parlamentanojn.

Dum sia mandato de Eŭropa parlamentano ŝi tre aktive subtenis Esperanton: unue dum la EEU-kongreso en Maribor kaj poste partopreninte en pluraj aranĝoj de EEU, organizis ekspozicion pri Esperanto en Brusela Parlamentejo kaj fine per rekta propono de amendoj rilataj al Esperanto en la Komitato por Kulturo de la Eŭropa parlamento, kiuj bedaŭrinde estis forĵetitaj ĉefe pro forta kontraŭstaro de la germana Eŭropa parlamentano Doris Pack, prezidantino de tiu Komitato.

EEU proklamis ŝin en 2008 honora membro de EEU kaj la proklamo okazis en Ljubljana okaze de Tago de Eŭropaj Lingvoj. Supozeble ŝi pretos subteni la poresperantan agadon ankaŭ en la estonto.

**Zlatko Tišljar**

## La angla kaj Esperanto: malsamaj lingvoj, malsamaj roloj, malsamaj komunumoj

Interesa estis la artikolo de Trevor Steele *Ĉu malesperi?* en la novembra numero de *La Ondo*.

Tiuj, kiuj malesperas pri la venko de Esperanto, estas tiuj, kiuj opinias, ke Esperanto devas kompari sin kun la angla lingvo en la nuntempa mondo. Tiuj du lingvoj havas tute malsamajn rolojn: la angla evoluis tra jarcentoj kaj akiris planedan prestiĝon post historia disvastiĝado kaj ekonomia supereco de la brita imperio kaj poste de Usono. Esperanto — kiel multaj aliaj samspecaj projektoj — naskiĝis el la kapo de idealisto kun superaj lingvaj kapabloj. La disvastigado de iliaj kreaĵoj estis multe pli malfacila.

Mi opinias, ke estas grava eraro pensi, ke Esperanto povas anstataŭi la anglan (aŭ iun ajn alian lingvon) nur pro siaj meritoj. Sur la pure lingva nivelo, neniu lingvisto povas nei, ke Esperanto havas valorajn kvalitojn, sed oni ankaŭ devas rekoni, ke la angla akiris tre praktikajn kaj valorajn kvalitojn

pro sia disvastiĝado kaj ĝenerala akcepto en multaj kampoj de la homa vivo. Esperanto bezonas ankoraŭ multe da tempo por atingi la nivelon de la angla en la sferoj teknologia, scienca, ekonomia ktp.

Miaopinie, ni devas koncepti la rolon de Esperanto alie. Ĝi jam havas bonan kvaliton kiel universala kaj neŭtrala komunikilo por la tuta homaro, laŭ la interna ideo de sia kreado. Kial ne kalkuli kun tiu kvalito por interesi tiujn, kiuj pensas laŭ la sama morala vidpunkto? Mi ne vidas konflikton inter la ideo ke la angla (aŭ iu ajn alia neplanita lingvo) estu la praktika internacia lingvo, kiel ĝi jam fariĝis, kaj ke Esperanto estu la lingvo de monda komunumo por kiu la moralaj kaj homaj kvalitoj estas pli gravaj.

Tio ne signifas ke ni esperantistoj ne devas dume prepari la terenon en la okazo se iun tagon la mondo estos preta akcepti pli neŭtralan internacian komunikilon. Ni povas daŭrigi la laboron pri ellaborado de fakaj terminologioj, kiuj permesus komunikiĝi kun la sama fleksebleco kiel la angla kaj aliaj naturaj lingvoj nuntempe permesas.

Se Esperanto daŭrigos sian evoluon sur la terminologia kaj literatura kampoj, ĝi almenaŭ anstataŭos aliajn planitajn lingvojn — ekzistantajn kaj estontajn — kaj pli facile povos roli kiel konvena internacia komunikilo, kiam la homaro estos sufiĉe evoluinta por konsideri aspektojn aliajn ol pure historian, politikan aŭ ekonomian disvolviĝon.

**Trefflé Mercier**

## Ne! al la dolaro! Ne! al la angla!



Kiel Radikaluloj ni ĉiam rigardis kun kontraŭemo ĉiujn monopolojn. Pro tio ni pozitive rigardis al Ĉinio kaj Japanio, kiuj decidis forlasi la dolaron por siaj komercaj kaj financaj interŝanĝoj. Sed nun oni devas ankaŭ forlasi la anglan por la kulturaj interŝanĝoj.

Ne estas plu eble sekurigi al la anglo-usona mondo vivi per rento: dolaroj venditaj al la mondo, kies reala kosto estas tiu de papero, inko kaj tipografio; lingvo, kies reala kosto estas nula, konsiderinte ke ĝi estas ilia denaska lingvo.

Eŭropo estas, anstataŭe, ĉiam plu submetata al la superregado de la angla kaj ekonomie atakata, ĉar ĝi komencis erodi, per la eŭro, la mondan monopolon de la dolaro.

La eŭropaj patriotoj devas batali por la sendependeco for de la angla kiel lingvo por la interŝanĝoj, same tiel oni faris sur la ekonomia fronto iniciatinte la eŭron, sola supernacia mono en la mondo, kiu, ne hazarde, estas nun atakata fare de la merkatoj kaj de la anglo-usonaj povoj, por miskreditigi ĝian valoron kaj ĝian kreskantan gravecon je internacia nivelo.

Nur elirante de la jam strekita sulko de la angla, kiu diskriminacias ĉiujn ne denaskajn parolantojn en ĉiu kadro, ekonomia, kultura kaj labora, kaj iniciatante Esperanton kiel eŭropan federalan lingvon, estos eble havi Eŭropon, kiu forĝu sian sorton.

**Giorgio Pagano**

**Ne forgesu (re)aboni**



ekde decembro 1998



ekde oktobro 2000



ekde oktobro 2003



ekde aprilo 2011

## Interreta tempovojaĝado

Ĉiu, kiu havas sperton pri kreado/prizorgado de retejoj scias, ke la laboro ne finiĝas per lanĉo de la retejo kaj per aldonado de novaj tekstoj. Modernaj teknologioj rapidege evoluas, progresas kaj oni devas sekvi ilin — daŭre prizorgi kaj plibonigi sian retejon ankaŭ el la teknika flanko. Lasi retejon sen ŝanĝoj dum kelkaj jaroj povus signifi, ke por novaj interret-uzantoj ne plu ĉiu enhavo restos atingebla kaj legebla senprobleme.

Ekzemple, la retejo de slovakaj esperantistoj [www.esperanto.sk](http://www.esperanto.sk) “dormis” dum pluraj jaroj — mankis rimedoj por prizorgi ĝian aspekton, por renovigi ĝin — kaj kvankam la enhavo restis alirebla, ĝeneralaj postuloj kaj bezonoj ŝanĝiĝas. Ni sentis bezonon renovigi ĝin, doni al la retejo pli modernan, “malpezan” aspekton.

Antaŭ nelonge la revo realiĝis kaj okazis kompleta rekonstruo. Sed post iom da tempo la situacio ripetigis: kio hodiaŭ

ŝajnas al ni nova, moderna, perfekta, post mallonga tempo iĝas malnova, arkaika. En la interreta mondo 5–10 jaroj estas ege longa tempo.

Rememoru nur, kiel retpaĝoj aspektis antaŭ tiu tempo. Kiel aspektis Guglo en siaj komencoj, Youtube, Vikipedio, Lernu!... Se vi ne plu memoras, refreŝigu vian memoron per paĝar-arkivoj: datumbazoj de miliardoj da paĝoj, konservitaj malnovaj retejoj de antaŭ multaj jaroj.

Ekzemplo estas la servo WayBack Machine, per kiu vi povas rigardi historion de retejoj, eĉ tiuj ne plu ekzistantaj. La servon prizorgas neprofito organizo Internet Archive kaj la arkivo enhavas milionojn da retpaĝoj, arkivataj ekde la jaro 1996 ĝis nuntempo.

Kiel uzi la servon?

Ĉe la ĉefpaĝo <http://www.archive.org/> (en la sekcio “Web”) entajpu la adreson de la retejo, kies historion vi deziras rigardi (pli precize: rigardi, kiu enhavo troviĝis en la konkreta domajno dum la jaroj). Aperas kalendaro kun tempolinio, sur kiu vi povas serĉi deziratan daton. Koloraj markoj indikas, ke por tiuj ĉi datoj disponeblas arkivaĵo.

Ni rigardu la menciitan [www.esperanto.sk](http://www.esperanto.sk). Por ĝi aperas kalendaro ekde 1998. Post klako sur la jaro 1998 ni ekscias ke ekzistas arkivaĵoj por la 3a kaj 12a de decembro. En la unua arkivaĵo troviĝas paĝo de la revuo *Esperantisto Slovaka*. Poste aperas anstataŭ tio reklamo pri tradukistaj servoj. Ekde oktobro 2003 ekaperas la aspekto, kiu restis ĝis aprilo 2011, kiam okazis kompleta rekonstruo. Kvankam la paĝoj ofte aperas sen bildoj, la servo transportas nin en pasintecon kaj donas al ni belan imagon pri la tuta evoluo de retejo.

Danke al interret-arkivoj ni povas rigardi multajn famajn, hodiaŭ ne plu ekzistantajn paĝarojn. Tiel troveblas arkivaĵo por eLibrejo de Franko Luin (tamen la elektronikaj libroj ne plu atingeblas per arkivo), aŭ la retportalo Ĝangalo funkciinta ĝis 2008. Aŭ scivolemuloj povas rigardi, por kio servis la domajno [esperanto.com](http://esperanto.com) pasintece, ĝis kiam ĝi estis aĉetita por “Esperanto-komunumo”.

Ne opiniu ke la afero havas nur “nostalgian” utiligon. La arkivoj helpas konservi nepresitajn dokumentojn kun kultura, historia kaj arta valoro por postaj generacioj, konservi la plej diversajn konojn kaj informojn.

Tamen atentu pri alia flanko de la konservado — plene konsideru sekvojn de publikado de ajnaj personaj informoj ĉe interreto! Ne kredu, ke la informoj post ŝanĝo de retej-enhavo malaperas por ĉiam...

Katarína Nosková

La 9an de novembro 2011 en Romo forpasis

### Enrico Dondi (1935–2011)

kuracisto kaj esperantisto (ekde 1954), laŭreato de Bel-artaj Konkursoj, tradukinto de, inter alie, *La Dia komedio* (Dante, 2006) kaj *Jerusalemo liberigita* (Tasso, 2010).

La 10an de decembro 2011 en Zagrebo forpasis

### Vida Jerman (1939–2011)

kroata teatra kaj filma aktorino, ŝi ekde 1973 aktorinis ankaŭ en Esperanto, ekde 1986 en UKoj. Ŝi kunfondis en 1997 la teatran trupon *Ponto*, kies arta direktoro ŝi estis. Ŝia deklamado aperis kasede (1996) kaj diske (2002). En 2010 ŝi ricevis Diplomon de UEA pro Elstara Arta Agado. En 1997 la prezidento de Kroatio distingis ŝin per ordeno pro ŝia kontribuo al la teatra arto kaj prezentado de la kroata kulturo.

La 19an de januaro 2011 en Moskvo forpasis

### Vladimir Vladimiroviĉ Korĉagin (1931–2012)

instruisto de matematiko kaj fiziko, esperantisto ekde 1957, instruanto kaj propagandanto de Esperanto, unu el la fondintoj de la Moskva societo *Fajrero*, aktivulo de la Moskvaj E-klubo *Scio* kaj *Lev Tolstoj*.

*Ni funebras kaj kondolencas.*



## Julio Baghy, homo homa

La hungara aktoro Gyula (ekde la esperantistiĝo: Julio) Baghy (1891–1967), siavice filo de aktoro kaj de sufloristino, jam juna verkis poemojn kaj novelojn hungarlingve; sed rekrutite en la hungara armeo por la unua mondmilito li malsaniĝas kaj la hospitalo kie li troviĝas estas konkerita de la rusoj. Komenciĝas sesjara militkaptiteco, travivita en diversaj kampoj kaj tendaroj, puŝite ĝis Siberio. Dum tiu tempo li komencas poeti en Esperanto (lernita en 1911) kaj instrui la lingvon al siaj diversnaciaj samsortanoj.

Post longa revenvojaĝo tra sudaj maroj fine li atingas Budapeŝton kaj komencas fervore agadi: verviganto de la E-Rondo Amika, gvidanto de kursoj, organizanto de literaturaj vesperoj, tuj en la redakta komitato de *Literatura Mondo*.

Post premiere manskribita kajereto *Bukedo*, en 1923 aperas la poemaro *Preter la vivo*, parte verkita ankoraŭ en Siberio kaj dum la reveno hejmen; enestas ankaŭ pecoj muzikitaj, plejparte de lia kunulo en militkaptitejo, Miĥaelo Sárosi. Poezian antaŭulon Baghy rekonas en Privat, kies temojn, kiel pri papilio kaj pri tombejo, li sporade tuŝas.

Ĉefaj temoj? Junula amo al knabinoj, tuthomara amo, hororo pri la milita besteco, virinoj solaj kaj malfeliĉaj. Multo biografia enestas: la seniluziĝo pri la edzino, kiu ne atendis lin dum tiom da jaroj, la tenera patra amo al la filino. Baghy vidas ĉion tra persona lupeo: pronomo “mi” superabundas, la “ni” rivalas laŭ ofteco.

En tiu volumeto hodiaŭa kritikisto malkovrus pli ol unu mankon: konceptoj tro ripetitaj, iuj versoj preskaŭ nur kejlaj, pluraj rimoj preskaŭ ŝablonaj. Sed la melodio de la versoj, la tute simpla lingvo, la temaro perfekte kongrua kun la “internacia pacifism-esperantisma romantikismo” igos lin amata: Baghy fariĝas la unua poeto legata de sia popolo. Lia melankolia tristo, la tragike finiĝintaj amoj sorĉas la leganton:

*Ne estas por mi ĝojo en la viv',  
nek flor' printempa, nek sunbrila flamo...  
Ĉe orfa tombo ĉe la montdekliv'  
Mi preĝas plore pri l' entomba amo.*

Li ŝatas alpreni la rolon de vagabondo: mizera, senespera, vivanta nur apud kaj per siaj versoj. Apud forno (ripetita temo) li priploras la malfeliĉon de sia dispeliĝinta familio, kaj ankaŭ sopiro al morto estas temo ripetita...

Tamen ne malofte montriĝas majstra traktado de aliteracioj kaj sonalternoj, helpata de la tipografia aranĝo:

*Ond'  
post ond'  
en danca rond',  
zuma kaj brua,  
ĉe fulmotondro skua  
jen sible susure ĝemas,  
jen muĝe murmure blasfemas  
kaj jetas sin al rip' de l' baraktanta ŝip'  
por peli ĝin per puna fort', pacigi nin kun tera sort'  
— en mort'...*

Aperos poste aliaj poemaroj pli rafinitaj teknike, sed vere novajn inspirtemojn li ne trovos plu. Lia famo kreskas ĉefe pro la noveloj kaj la romanoj, kaj lia vivo iĝas malpli premata,

sed pli intensa: li aktoras kaj reĝisoras en la UK-oj, iniciatas la tagon de la libro je la naskiĝtago de Zamenhof, gvidas Cseh-metodajn kursojn diverslande. Lia ĉeesto plurloka, lia bonkora vizaĝo de amema instruisto, lia homeco kaŭzas, ke multaj lernantoj aŭ konatoj lin nomas “Paĉjo” (ankaŭ mi, kiu tre agrable restis kun li dum la UK en Bolonjo, 1955).

Lian popularecon nutras la sinsekve aperantaj verkoj: romano *Viktimoj* (1925) kun sia daŭrigo *Sur sanga tero* (1933), poemaro *Pilgrimo* (1926), la satira romano *Hura!* (1930). Baghy poeto osciladas inter espero kaj pesimismo, kvankam la dua forte superas la unuan. Sian trian poemaron *La vagabondo kantas* (1931, 2a eld. kompletigita 1937) li mem nomas “simplaj versoj”; fakte li gurde ripetas siajn rimojn kaj temojn, helpate de lulanta melankolio: *Ludas la cigano: / violono ploras. / Pri l' pasinta amo / koro rememoras...*



En 1937 aperas romaneto *La verda koro* pri la vivo en Siberio, la Esperanto-kursanoj, embria amo inter la kursestro (identiĝo de Baghy mem) kaj loka junulino. Sukceso vasta, represoj multaj dum duona jarcento: verkon kun Esperanto kiel ĉeftemo la publiko avidas.

La mioldolĉe siropa amovelo *Printempo en la aŭtuno* (1931) transdonas stafetbastonon al la plej granda produkto de la postmilita Baghy kaj eble de la esperanta poezio entute: la triakta lirika dramo *Sonĝe sub pomarbo* (1958) kvazaŭ plenumas deziron esprimitan en tiu novelo. Du gejunuloj, Adamo kaj Eva, sonĝas kaj filozofumas sub la Pomarbo, simbolo de la eterna Vivo; ĉirkaŭ ili orbitas mitologiaj kaj modernteknikaj figuroj, la “homunkuloj”, la Faŭno, la Nimfo kaj la saĝa Strigo, kiu ilin admonas tiel:

*La Vivo ŝajnas monstra maro;  
sur ĝi la Homo — ludoŝip'.  
Ne gravas kvanto de la varo  
nek la kvalito nek la tip'.  
La ŝipo serĉas rodon; fate  
ĉe bord' perdiĝas ĉiam cel';  
do onfrapite sortpelate  
ĝi velas plu kun dub' esper'  
kaj ek laŭtajde ondorajde  
de ondosupro al ondvalo  
ŝanĝinte ofte revojn trajte  
sed nesciante pri l' kialo.  
Kialon senlimec' ne havas  
(la monstra maro ludas nur)  
la ŝipon lulo, skuo trafas;  
ĉe ĉiu ondo — aventur'.  
La Homo, estro de la Ŝajno,  
imagas sin ja suveren',  
nur pensas pri la ebla gajno,  
disipas forton en la pen'  
kaj ek plenvele novacele  
nescie pri la ŝiporompo  
li drivas fide kaj sinpele  
ĝis glutas lin la — ondotombo.*

La grandajn temojn de la vivo Baghy traktas alimaniere ol Auld, sed same intense: la sonĝo permesas al li alveni al pura, eksterfilozofia poezio. Kelkaj aliaj verkoj, poeziaj, novelaj kaj teatraj sekvos en la postaj jaroj, sed tion kion Baghy povis diri, li jam diris sonĝante sub pomarbo.

Carlo Minnaja

# Verkoj, kiuj donas honoron al la verkinto

## de Aleksander Korĵenkov

**Antaŭ 175 jaroj, la 27an de januaro (Gregorie: la 8an de februaro) 1837 en Suwalki (Pola Reĝlando en Ruslando) en la familio de Fajba Volfoviĉ kaj Rajna Percovna Zamenhof naskiĝis Motel, pli bone konata kiel Mark Fabianoviĉ (Esperante: Marko) Zamenhof, la patro de la aŭtoro de Esperanto. Okaze de ĉi tiu datreveno ni aperigas artikolon pri lia verkista agado en la pedagogia sfero.**

“Inter la aŭtoroj de saĝaj verkoj la saĝulo Zamenhof famiĝis per siaj utilaj verkoj, kiuj estis akceptitaj en ŝtataj lernejoj fare de la ministro pri klerigo, kaj ĉiuj ĉi verkoj donas honoron al ilia verkinto”<sup>1</sup>, — skribis Naĥum Sokolov la 26an de januaro (la 7an de februaro) 1888 en la hebrelingva Varsovia gazeto *Hacefira*.

Pri kiuj verkoj temas? Adolf Holzhaus estis la unua, kiu en 1969 listigis kelkajn librojn de Marko Zamenhof<sup>2</sup>. Sed nenion konkretan pri tiuj libroj li povis skribi, ĉar li ne vidis la librojn mem kaj nur uzis reklampaĝon de la dua eldono de la *Kompara frazeologio*. Nur post 40 jaroj Zbigniew Romaniuk donis pli ĝustajn bibliografiajn indikojn<sup>3</sup> pri kelkaj el la libroj.

Kie oni serĉas kaj trovas librojn? En biblioteko! Do — al biblioteko. Nome, al la Ruslanda Ŝtata Biblioteko (RŜB, eksa biblioteko Lenin) en Moskvo, tre proksime al Kremlo.

La serĉilo en la reta katalogo de RŜB<sup>4</sup> rapidege kompilis liston de la libroj de Mark Fabianoviĉ Zamenhof, kiujn la biblioteko posedas. Da ili estas 36. Pli ĝuste 35, ĉar unu el la libroj (Замenhoф М. Ф. *Город и деревня в преступности*. М., 1913) estis verkita ne de nia Marko, sed de Miĥail Fabianoviĉ Zamenhof, filo de Fabian Joseleviĉ Zamenhof, kiu siavice estis filo de Josel Fabianoviĉ Zamenhof — la frato de Marko, konata inter la esperantistoj kiel onklo Jozefo. Do, 35 titoloj.

La retaj informoj ne estas centprocente fidindaj. Ni ĵus vidis, ke oni erare atribuis al Mark Zamenhof, libron de nepo de lia frato, Miĥail Zamenhof (lia filino Zoja Miĥajlovna Zamenhof iom aktivis por Esperanto). Krome, en la enskriboj estas erar(et)oj. Kaj, fine, RŜB posedas ne ĉiujn eldonojn. Mi do kelkfoje venis al RŜB por esplori ĉiun el la titoloj (sed ne ĉiujn reeldonojn). Ni vidu la rezulton.

### Lernolibro de la germana

Marko Zamenhof verkis kaj eldonis tri lernolibrojn de sia kurso de la germana lingvo. La unua havas la titolon *Lernolibro de la germana lingvo por rusa junularo* kun la subtitola klarigo: “Laŭ tre sukcesa metodo kompilis M. F. Zamenhof”. Ekde la 6a eldono ĝi transformiĝis al: “Laŭ tre sukcesa metodo kompilis M. F. Zamenhof, instruisto de la germana lingvo de la Varsovia Reala Lernejo”.

La unua eldono<sup>5</sup> aperis en 1871 en la presejo de I. Goldman en Varsovio. Ĝi estis cenzure prespermesita la 5an de decembro 1870. Fine de sia antaŭparolo la 33-jara Bjalistoka instruisto Zamenhof skribis: “Mi tre deziras, ke ĉi tiu lernolibro ricevu pli vastan aplikosferon, kaj ke ĝi servu kiel sukcesa kaj fundamenta lernilo, kia ĝi estis ĝis nun ĉe instruado de la germana lingvo en la lernejo, kiun mi tenas”.<sup>6</sup>

La 10an (22an) de decembro 1871 en la gazeto *St. Petersburger Zeitung* ĉi tiun lernolibron recenzis nenomita fakulo el la Sankt-Peterburga Universitato, kiu skribis, interalie:

Inter la multenombraj germanaj gramatikoj kaj ekzerco-libroj por la rusa junularo ĉi tiu kajereto meritas altgradan atenton. Kompare kun la ekzistantaj gramatikoj ĝi ofertas la grandan avantaĝon de trafa kaj komprenebla prezento de la malfacilaj reguloj pri substantivo kaj verbo. Samtempe la tuto estas aranĝita praktike kaj facile uzeble. Ĉiu regulo estas klarigita en sekva ekzerco, por kiu la aldonitaj vortoj estas parkere lernendaj, laŭ taŭgaj ekzemploj, tiel ke la lernanto klare konsciiĝas pri la lernita gramatiko. La disdivido kaj aranĝado de la materialo estas tre superrigardebla, la laŭstupa progreso de la facila al la pli malfacila estas reguligita zorgeme, kaj la prilaborajo fakte povas esti taksita de la aŭtoro prave kaj rajte kiel laŭ la laŭcela metodo. Ĉi tio kaj la klara kaj konciza esprimmaniero tra la tuta kajero, la evitado de ĉio, kio povus senutile ŝarĝi la memoron de junulo, same kiel la brile elektitaj ekzercoj — ĉio kune helpas al la kajero gajni multajn amikojn, kaj ni ne dubu, ke la lernejojn, en kiuj ĝi estas enkondukita tuj post la apero, baldaŭ sekvos multaj aliaj.<sup>7</sup>

La lernolibro ja sukcesis, ĉar la lasta eldono posedata de RŜB<sup>8</sup>, aperis en 1899 en la Varsovia presejo de Aleksandr Gins kiel “la 14a eldono, grave kompletigita”. Ĝi estis prespermesita la 22an de decembro 1898.

En la katalogo de RŜB estas registritaj kvin eldonoj de ĉi tiu lernolibro: la 1a, 10a, 11a, 12a, 14a.

### La 2a germana lernolibro

La germana kurso de Marko Zamenhof estis triŝtupa. La lernolibro por la dua jaro konsistis el: gramatiko kaj ekzercoj (p. 1-61), rusaj artikoloj tradukendaj germanen (p. 62-80), germanaj tekstoj, inkluzive de poeziaj, tradukendaj rusen (p. 81-118), rusa-germana vortaro (p. 119-128), germana-rusa vortaro (p. 129-145). Ĉi tiun dividon mi prenis el la sesa eldono<sup>9</sup> presita en 1890 ĉe Aleksandr Gins en Varsovio (prespermesita la 12an de novembro 1889). Krom ĝi en la katalogo de RŜB estas nur la 7a eldono (1896). Ne estas klare, ĉu sekvis plia(j) reeldono(j) post la 7a.

Por gustumi la materialon, vidu fragmenton, tradukendan el la rusa al la germana, sed tradukitan de mi Esperanten:

La homo estas dotita per parolkapablo. Ĉi tiu kapablo estas ĝia ĉefa avantaĝo kompare kun la bestoj. La homoj, kiuj parolas la saman lingvon, konsistigas la saman popolon. Tiamaniere, ĉiuj rusoj parolas la saman lingvon — la rusan. Same, la germanoj. Same, la angloj k.t.p.<sup>10</sup>

Ankaŭ en ĉi tiu lernolibro estis presita recenzo de la sama fakulo el la Sankt-Peterburga Universitato, unue aperinta en *St. Petersburger Zeitung*, 1872, №86:

Ĉi tiu dua parto de la tre utiligebla lernolibreto, kiun ni rekomendis al atento de niaj legantoj jam antaŭ kelka tempo, montras la samajn kvalitojn kiel la unua, kiu entenas la morfologion. Ĉiuj reguloj de la sintakso estas prezentitaj superrigardeble koncize kaj klare kaj eksplikitaj per taŭgaj ekzemploj. Se unuflanke ĝi estas praktika kaj bona, aliflanke ne malmulte valora kvalito de la libreto konsistas en tio, kio mankas, t.e. kio estas



neglektata kiel negrava. Tiel multon, kio nur ŝarĝas la infanajn kapojn kiel nenecesa balasto, la aŭtoro eliminis ĝustavide, kaj instruistoj kaj lernantoj dankos tion al li.<sup>11</sup>

### La tria lernolibro, aŭ krestomatío

Ankaŭ de la triaŝtupa lernolibro en RŜB estas registritaj nur du eldonoj — la 5a (1892, prespermesita la 9an de decembro 1891) kaj la 6a (1899, prespermesita la 16an de novembro 1898), ambaŭ presitaj ĉe Gins. La 6a eldono havas la subtitolon “Krestomatío kaj libro por tradukado kun du vortaroj”. Tio perfekte klarigas la enhavon de la lernolibro, kiu konsistas el 140 paĝoj da tekstoj rusaj por traduki germanen, 102 germanlingvaj paĝoj tradukendaj rusen, kaj ambaŭflankaj vortaroj. Volonte mi aperigus ĉi tie kelkajn tekstojn, ekzemple *Pri la amo al la patrujo* (p. 20), sed eble estus utile doni du specimenajn leterojn. Evidente, ili estis verkita pli frue, eble, kiam Ludoviko studis en Moskvo aŭ laboris en Ĥerson for de la gepatroj. Tio donas neatenditan kromsencon al la leteroj.

1. Amata filo! Mi ne scias la kaŭzon de via longa silento. Pro la bona funkciado de niaj poŝtoj tute ne eblas supozi, ke leteroj ne atingas la adresojn. Kaj sciante viajn tenerajn sentojn al la gepatroj kaj al la familio, ne eblas pensi, ke vi ignoras korespondadon kun tiuj, kiuj vin amas eble pli ol sian propran vivon. Kruele ĉagrenas nin la penso, ke vi malsanas, kaj vi devas elkonduki nin el ĉi tiu turmenta stato kaj skribi per la plej frua poŝta sendo pri via sano kaj pri la kaŭzo de via silentado. Trankviligu nin per via letero, kiun ni atendas kun turmenta senpacienco.

Via patro P. P.

2. Kara paĉjo! Kun sincera ĝojo mi renkontas ĉi tiun tagon, la tagon de Via anĝelo, je kiu mi ricevas la okazon denove ripeti al Vi, kiel sincere mi amas Vin kaj kiel forte mi deziras al Vi ĉian feliĉon. Mi ne volas elokventi antaŭ vi per superflujaj frazoj, ĉar la multvorteco ne estas esprimo de la vera sento; aldone, verŝajne ankaŭ Vi mem estas certa, ke ne nur en ĉi tiu tago, sed ankaŭ en ĉiuj tagoj de mia vivo mi deziras al Vi feliĉon, prosperon kaj serenaniman trankvilon.

Via obeema filo N.<sup>12</sup>

Mi ne mencias metodikon, ĉar mi estas analfabeta pri ĝi. Sed estus interese kompari la ekzercojn kaj tekstojn el la tri lernolibroj de Marko kun la lerniloj de Ludoviko, ekzemple, kun la *Ekzercaro*. Ĉu Doktoro Esperanto utiligis la sperton de sia patro, kiun la famega cionisto Sokolov nomis “saĝulo”?

### Konciza gramatiko

En RŜB estas konservata la 5a eldono de la 14-paĝa *Konciza populara germana gramatiko (Kompare kun la rusa)*<sup>13</sup>, prespermesita la 13an de septembro 1891 kaj presita en 1892 ĉe Gins kun la kutima mencio de la posteno de Marko Zamenhof en la Varsovia Reala Lernejo. Senpretenda broŝureto, simila al amaso da koncizaj Esperantaj gramatikoj. Laŭ reklamoj, presitaj en aliaj libroj de M. Zamenhof, aperis almenaŭ sep eldonoj de ĉi tiu gramatiko.

Ni ne scias, kiam aperis la unua eldono, sed sendube antaŭ la 1887a jaro. La sama demando: Ĉu iu esploros ĉi tiun broŝuron de Marko por scii, ĉu ĝi influis Ludovikon ĉe la verkado kaj polurado de la sespaĝa *Plena Lernolibro* en la *Unua Libro*, kiu poste evoluis al la *Fundamenta gramatiko de la lingvo Esperanto* en nia netuŝebla *Fundamento*?

Daŭrigota

### Referencoj

1. Korjenkov A. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. 2a eld. Kaliningrado; Kaunas, 2011, p. 50. Tradukis Josef Ŝemer.
2. Holzhaus A. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinki, 1969, p. 15-16.
3. Romaniuk Z. *Zamenhofowie w drodze do i w Białymstoku*. Brańsk, 2009, p. 26-27.
4. <http://www.rsl.ru/ru/s97/s339/>
5. Заменгоф М. Ф. *Учебник немецкого языка для русского юношества*. Курс первый. Варшава, 1871.
6. Samloke, p. II.
7. Citata laŭ la 10a eldono de la lernolibro (Varsovio, 1890), kie ĝi estas tuj post la antaŭparolo. Tradukis Andreas Künzli.
8. Заменгоф М. Ф. *Учебник немецкого языка для русского юношества*. Курс первый. 14-е изд., значит. доп. Варшава, 1899.
9. Заменгоф М. Ф. *Учебник немецкого языка для русского юношества*. Курс второй. 6-е изд., испр. и пополненное. Варшава, 1890.
10. samloke, p. 63.
11. samloke, p. III. Tradukis Andreas Künzli.
12. Заменгоф М. Ф. *Учебник немецкого языка для русского юношества*. Курс третий. 5-е изд., испр. и доп. Варшава, 1892, p. 74.
13. Заменгоф М. Ф. *Краткая популярная немецкая грамматика (сравнительно с русской)*. 5-е изд. Варшава, 1892.



# Nia libroproduktado en la 2011a jaro

Ĉiujare ni resumas la libroproduktadon en Esperantujo, daŭrigante la projekton de *Hungara Vivo*. La statistika bazo estas la rubriko *Laste Aperis* en la revuo *Esperanto*, kiu listigas la librojn, kiujn la Libroservo de UEA ricevis kaj ekvendis en la aktuala jaro, sendepende de la eldonjaro.

Ĉi tia statistiko estas iom lama, ĉar ne ĉiujn novajn librojn ricevas kaj vendas la Roterdama libroservo; krome, *Laste aperis* registras ankaŭ “malnovajn novaĵojn”. Sed ĝi donas imagon pri la stato de libroeldonado en Esperantujo, precipe la resumaj tabeloj por pluraj jaroj.

[Pasint-jare la komentario estis ampleksa](#), ĉar estis revuitaj du kompletaj jardekoj da observado, kaj la fontolingva parto aperis en marto, sed ĉi-foje estas pli da nombroj, kaj malpli da vortoj.

La pasinta jaro estis pli magra ol averaĝe, aperis 172 libroj, kaj la libroj evidente malgrasiĝis ĝis nur 115 paĝoj. Feliĉe, ili iĝis ankaŭ malpli kostaj. Sed (mal)flusoj okazas ĉiujare, kaj ni ne donu tro da atento al ĉi tiu malkresketo.

Pasint-jare libroj en/pri Esperanto atingis Roterdamon de 78 eldonintoj, el kiuj 28 estas novaj. Inter la 172 eldonaĵoj estas 98 *veraj* libroj pli ol 48-paĝaj kaj 74 malpli ampleksaj broŝuroj, sed en nia statistiko ili ĉiuj estas konsiderataj kiel libroj.

Atentinda estas la nekutima tem-bildo: “laste aperis” nur malmultaj beletraĵoj (39 kompare kun 70 en 2010), dum multiĝis libroj esperantologiaj kaj interlingvistikaj (63 kompare kun 54).

Kial tio okazis?

La beletrofalon klarigas tio, ke en 2010 surmerkatigis pli multaj beletraĵoj ol kutime, sed la plimultiĝon de libroj pri-esperantaj kaj interlingvistikaj kaŭzis hazardo: la libroservo de UEA dum 2011 ricevis kaj ekvendis 29 tiutemajn broŝurojn, kiujn André Cherpillod eldonis en sia vilaĝo Courgenard sianome kaj sub la eldonmarko *La Blanchetière* dum la lastaj dek-kelkaj jaroj.

Se la dokta esperantologo Cherpillod eldonus nur ununome, li certe ricevus la ĉampionan palmokronon, sed, ĉar li havis du eldonejojn, la plej multaj libroj al nia merkato la trian jaron sinsekve venis el alia franca vilaĝo, Embres-et-Caltelmaure, kie Vilhelmo Lutermano kun la eldonmarko

MAS produktis 26 librojn kaj broŝurojn, plejparte pri temoj politikaj, de/pri Markso kaj Engelso (kune kaj dise), Lenin, Pleĥanov, Dimitrofo (t.e. Dimitrov) kaj aliaj maldekstraj aŭtoroj malnovaj kaj nuntempaj, kiujn li plejparte mem tradukis. MAS unualokas ankaŭ paĝonombre.

## 2011. Libroj

MAS (FR).....	26
A.Cherpillod (FR) .....	19
La Blanchetière (FR) ....	10
Impeto (RU) .....	8
Mondial (US) .....	8
Iltis (DE).....	7
KAVA-PECH (CZ) .....	4
Horizonto (JP) .....	4
W.Nüesch (CH) .....	4
UEA (NL) k. a.....	3

## 2011. Paĝoj

MAS .....	3045
Mondial. ....	1844
Ĉina Fremdl. eld. (CN)...	1282
Impeto.....	999
Lexicon Silvestre (DE)....	705
Horizonto .....	644
Iltis .....	558
KAVA-PECH.....	525
A.Cherpillod.....	492
Dana E-Asocio .....	458

Estas iom maltrankvilige, ke tute nenion eldonis tiuj, kiuj dum pluraj jaroj estis en la supro de la listo: *Libro-Mondo* de Tomasz Chmielik, *Fonto*, *Bero*, Ĉina E-Eldonejo, Societo Lorenz... Nur po unu libro venis el FEL (*La Jaro*), *Sezonoj* kaj *Edistudio*. Ĉu provizora malaktiviĝo? Ni vidos, eble post unu jaro de iu el ili *laste aperos* dudeko da titoloj...

La resumaj tabeloj por 21 jaroj ne multe ŝanĝiĝis kompare kun la 20-jara tabelo, krom ke *Impeto* devancis *Fonton* kaj en la unua deko fine aperis MAS.

## 1991-2011. Libroj

UEA .....	147
Libro-Mondo (PL) .....	133
FEL (BE) .....	112
Impeto.....	90
Fonto.....	85
Sezonoj .....	82
Iltis .....	77
KAVA-PECH.....	75
MAS .....	64
Bero (US/NL).....	58

## 1991-2011. Paĝoj

FEL.....	19863
UEA .....	17763
Libro-Mondo .....	17477
Impeto.....	14477
Fonto.....	13653
Sezonoj .....	13242
KAVA-PECH.....	12817
Arĥivaro E.Private (CH) .	12553
Ludovikito (JP).....	12085
Ĉina E-Eldonejo (CN) ..	11796

Francio, kies eldonaĵoj antaŭ unu jaro finfine superis tiujn de Germanio, daŭrigis la antaŭenmarŝon. Dum la dudeko unu

	1991–2010	2009	2010	2011	1991–2011
Nombro de libroj en/pri Esperanto	4020	158	204	172	4192
Suma paĝonombro de ĉiuj libroj	527.892	24.272	28.232	19.775	547.667
Nombro de la eldonintoj	1038	88	94	78	1066
Averaĝa paĝonombro de unu libro	131,3	153	138	115	130,6
Averaĝa prezo de unu libro (eŭroj)	9,7	11,77	12,36	10,28	9,75
Lernolibroj, vortaroj k. s.	603	17	32	18	621
Originala beletro	472	27	20	13	485
Traduka beletro	819	20	50	26	845
Planlingvistiko, esperantologio, lingvistiko	440	26	16	37	447
Esperanto: historio, movado, kulturo k.s.	540	23	38	26	566
Politiko, historio, filozofio, socio	394	25	29	33	427
Scienco kaj tekniko, terminaroj	275	6	6	7	282
Religio	198	7	6	7	205
Aliaj temoj	279	7	7	5	284



jaroj de la statistikado, ankoraŭ en neniuj landoj aperis tiel multaj libroj kaj broŝuroj (entute 62, el ili 55 en la du menciitaj vilaĝoj) pri/en Esperanto! Surprize falis la eldonado (nur po unu libro) en Brazilo kaj Belgio.

2011. Libroj	2011. Paĝoj
Francio . . . . . 62	Francio . . . . . 4143
Germanio . . . . . 18	Germanio . . . . . 2376
Ruslando . . . . . 12	USA . . . . . 1844
Pollando . . . . . 11	Ruslando . . . . . 1545
Nederlando . . . . . 9	Ĉinio . . . . . 1508
Usono . . . . . 8	Pollando . . . . . 888
Ĉeĥio . . . . . 7	Japanio . . . . . 886
Japanio . . . . . 7	Nederlando . . . . . 836
Italio . . . . . 4	Ĉeĥio . . . . . 806
Svislando . . . . . 4	Danlando . . . . . 458

Tamen la resumaj tabeloj restis preskaŭ senŝanĝaj, kaj ili respegulas la realan staton de la Esperanto-eldonado en la mondo dum la lastaj 21 jaroj. Same kiel en la individua membraro de UEA kaj en la partoprenantaro de la Universallaj Kongresoj plej altas Francio kaj Germanio.

1991-2011. Libroj	1991-2011. Paĝoj
Francio . . . . . 467	Francio . . . . . 49929
Germanio . . . . . 392	Germanio . . . . . 46973
Pollando . . . . . 316	Japanio . . . . . 38924
Nederlando . . . . . 292	Ruslando . . . . . 37317
Ruslando . . . . . 255	Pollando . . . . . 36125
Japanio . . . . . 217	Nederlando . . . . . 32942
Brazilo . . . . . 211	Brazilo . . . . . 30647
Usono . . . . . 192	Belgio . . . . . 24276
Italio . . . . . 165	Svislando . . . . . 24064
Belgio . . . . . 149	Italio . . . . . 23693

En la pasinta jaro mi verkis [apartan artikolon](#) pri la libroj tradukitaj. Ĉi-jare mi nur mencias, ke danke al la multaj tradukoj de politikaj el la germana, eldonitaj de MAS, la germana lingvo superis la francan kaj iĝis la lingvo el kiu oni plej multe tradukas en Esperanton.

2011	1991-2011
Germana . . . . . 22	Germana . . . . . 166
Rusa . . . . . 6	Franca . . . . . 161
Franca . . . . . 5	Angla . . . . . 144
Pola . . . . . 3	Rusa . . . . . 82
Ĉina . . . . . 2	Pola . . . . . 58
Hispana . . . . . 2	Ĉina . . . . . 52
Itala . . . . . 2	Portugala . . . . . 52
Japania . . . . . 2	Japania . . . . . 50
Latina . . . . . 2	Itala . . . . . 45
Portugala . . . . . 2	Jida . . . . . 45

Plej multe tradukis Vilhelmo Lutermano por MAS — entute 15 librojn kaj broŝurojn, ege pli multe ol la sekvantoj: la sviso W. Nüesch kiu tradukis el la germana kvar librojn de Rudolf Steiner, kaj la nederlandano Gerrit Berveling kun tri tradukoj.

Nature, André Cherpillod danke al siaj broŝuretoj, eldonitaj en dek kelk lastaj jaroj iĝis la plej populara aŭtoro: dum 2011 UEA ekvendis 25 liajn librojn, dum la dua plej eldonita aŭtoro estas la jam menciita Steiner kun 4 libroj, kiun sekvas Karlo Markso kaj Hori Jasuo kun po 3 libroj.

*Bonan legadon!*


**Aleksander Korĵenkov**

## Zamenhof en la slovakaj

La 12an de decembro 2011 okazis en la Pola instituto en Bratislavo solena vespero okaze de Zamenhofa Tago. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 40 personoj, plejparte el Slovakio. Same kiel pasintjare, por la publiko estis preparita programo kun prezentoj rilataj al Zamenhof kaj Esperanto.

La publiko konatiĝis i.a. kun la revuo *Esperantisto Slovaka*, nova Esperanto-literaturo kaj per foto-prezentado kun gravaj Esperanto-aranĝoj okazigitaj en 2011 kaj planataj por 2012.

Alia programero estis spektado de unu ĉapitro el la filmo *Esperanto estas*. Prelegoj estis interplektitaj per kultura programo — slovakia folkloro de du junaj slovakaj kantistinoj, popularaj kantoj kaj deklamo de poemo en Esperanto.



La ĉefa programero estis lanĉo de nova verko de la eldonejo *Espero* — slovakaj traduko de la biografia skizo *Zamenhof* de Aleksander Korĵenkov. Per ĉi tiu libro, kun la titolo *Život Zamenhofa. Život, dielo a myšlienky autora esperanta* [= Vivo de Zamenhof. Vivo, verkaro kaj ideoj de aŭtoro de Esperanto] pleniĝis malplena loko sur slovakaj merkato, ĉar slovaklingvaj libroj pri Esperanto, ĝiaj historio, evoluo kaj iniciatinto nur malofte aperas.


La libro estas elstara traduko de slovakaj esperantistoj Pavol Petrík el la angla kaj Esperanta eldonoj. La originan tekston verkis en Esperanto la Ruslanda ĵurnalisto kaj zamenhofologo Aleksander Korĵenkov en 2009. Tuj poste Ian Richmond tradukis ĝin al la angla. Kaj nun estis prezentita la slovakaj versio kun transprenita origina enkonduko de Humphrey Tonkin. La slovakaj versio transprenis ankaŭ *Ĝisdatoj pri Esperanto*, kiu troviĝas fine de la libro. Tamen la unuopaj ĉapitroj estis riĉigitaj je ilustraĵoj kaj je informoj destinitaj speciale por la slovakaj legantoj. Aldonaj fotoj el la vivo de Zamenhof aperis ankaŭ en la biografio mem, kaj en bibliografia listo de rilata literaturo troveblas pliaj slovakaj “ĝisdatigoj”.

La verko detale priskribas la Zamenhofan vivon, liajn originon, familion, pensojn, ideojn, samkiel la socion de la epoko en kiu li vivis. La publiko ofte kunigas Zamenhofon nur kun ideo kaj kreo de internacia lingvo. La libro de Korĵenkov pruvas, ke liaj ideoj estis multe pli larĝaj, kaj ke lia spirito ne limiĝis je lingva problemaro.


La eldono de la libro estas la unua kontribuo de slovakaj esperantistoj al la 125a jubileo de la internacia lingvo. La eldonon finance subtenis la Pola instituto kaj slovakaj esperantistoj.

La 96-paĝa libro estas mendebla kontraŭ 4,90 eŭroj ĉe la eldonejo *Espero*:

<http://espero.sk>.



**Katarína Nosková**



## Verda salato sur bela plado

**Sen Rodin. *Nu, kaj do?: Rakontoj, raportoj, recenzoj, revoj.* — Kluĵo: Exit, 2010, — 160 p.**

Sen Rodin estas plumnomo de la malnova itala esperantisto (ekde 1940, kiam li estis okjara) Filippo Franceschi. *Nu, kaj do* estas lia dua libro, kaj la unua aperis nur en 2007 (*Bildoj pri norda lando*).

En tiu ĉi libro li kolektis ĉion, kio aperis elsub lia plumo (aŭ klavaro) dum lastaj jaroj. Rezulte sub unu kovrilo troveblas beletraĵoj fikciaj (kaj eĉ fantasta, kiel *Perdita ŝanco* kaj *La terno*), rakontoj, bazitaj sur rememoroj kaj vivosperto (*Sekso en la scienca liceo*, *La ŝtelo-manao* k.a.), literaturologiaj skizoj (*La aventuroj de Pinokĵo*), meditoj pri Esperanto (*Nu, kaj do?*, *Gramsci kaj Esperanto*, *Esperanto* k.a.). Unu el la gravaj temoj, kiuj elvokas ĉe la aŭtoro indigniĝon kaj sarkasmon en kelkaj eseoj, estas burokrataj reguloj kaj senanimaj oficistoj (*Sankta Maria*, *Moder-na poŝto*). Unu eseo estas eĉ nekutimforma nekrologo pri Madeleine de Zilah (*Silanverinoj*), verkita en la formo de fajna poezieca fantasta skizo... Kelkaj pecoj (*Kluĵo*, *Arboj*) estas dediĉitaj al Rumanio — kiu, kiel eblas kompreni, fariĝis lastatempe la dua propra lando por la aŭtoro.


La miksaĵo el pecoj de diversaj ĝenroj konsistigas, tamen, iun koheran tuton, kiu prezentas la animon kaj pensmanieron de malnova arda esperantisto, kun certa verda mondkoncepto kaj firmaj konvinkoj kaj, samtempe, poezieca rilato al ĉio ajn. Tial la bunta diversspeca “salato” neatendite aspektas tute organika!

Nepre indas laŭdi la fluan kaj belan lingvaĵon. Plezurigas legi. Nur unu makuleto ekzistas ĉi-rilate: la aŭtoro konstante uzas la misteran ekstervortaran vorton “kozo”. Laŭ la kunteksto ĝin plej ofte (sed ne ĉiam!) eblas interpreti kiel “okazaĵo”, “afero”, “evento”... Sencon enkonduki ĝin (des pli sen klarigoj) mi ne trovas, kaj por la ruslingvano tiu stranga neologismo sonas terure ridinde!

Necesas aparte laŭdi la aspekton de la libro. Kutime niaj libroj entenas nur nudajn tekstojn. Tiu ĉi libro, male, estas ne nur aranĝita kun bona gusto, sed ankaŭ ornamita de originalaj profesinivelaj ilustraĵoj far Serena Franceschi. Tial la libron agrablas ne nur legi, sed eĉ simple teni en la manoj. Do, tre impona estas la plado, sur kiu “la salato” estas prezentata de la aŭtoro.

Ĝenerale, la libro estas rekomendenda por ĉiuj legantoj, kiujn interesas Esperanto-kulturo entute, aparte al tiuj, kiuj ŝatas legi kaj iom mediti pri la legitaĵo.

**Nikolao Gudskov**



## Omaĝo al Brassens

**Yvart, Jacques. *Brassens plu.* — Donneville: Vinilkosmo, 2011.**

En sia [artikolo](#) *Duobla jubileo de Georges Brassens* Jacques Yvart skribis, ke “Brassens certe estas la plej grava kanzonisto-poeto de la 20a jarcento” (LOdE, 2011, №10). Apenaŭ Brassens certe estas la pleja en la mondo (probable en Eŭropo jes) — ekzemple, Bob Dylan aŭ Leonard Cohen estas ne malpli *certaj* gravegaj poetoj-kanzonistoj, kvankam ĉiuj ili laboris/as en variaj malsimilaj stiloj. Sed nepre ili ĉiuj estas en la pleja supro, do ankaŭ Brassens.

La prezentata albumo nomiĝas *Brassens plu* — kio jam estas sufiĉe bona ĝia priskribo. Temas do pri la kantoj de Brassens plenumo de Yvart, kaj tio ne

estas la unua tiaspeca albumo. En 1998 Yvart jam aperigis diskon kun same simpla titolo *Jacques Yvart kantas Georges Brassens*. La nova albumo estas omaĝita al la 90-jariĝo de la naskiĝo kaj 30-jariĝo de la morto de Brassens, kiuj ambaŭ okazis en 2011.

El la malnova albumo en la novan eniris ĉiuj ses kantoj (*La geamantoj sur la verda benk’*, *La pluvombrelo*, *Kanto por la kampul’*, *En akvo de la klara fonto*, *Povra Marteno* kaj *Tuj la kompanar’*), kaj krome sep pliaj (*La longa vico*, *La ĉevaleto*, *La lamanta reĝo*, *La marista amo*, *Oĉjo Leon’*, *Johano la Neavertinto* kaj *Milito*).

Ne ĉiuj kantoj estas verkitaj de Brassens — en kelkaj li aŭtoris nur la muzikon, kaj al unu (*Johano la Neavertinto*) li havas formale neniun rilaton, ĉar ĝian tekston verkis Norvegio, kaj muzikon — Yvart mem. Sed la kanto laŭ sia spirito estas tute “Brassensa”, kaj do estas tute harmonie enplektita en la albumon.

La kanto *Povra Marteno*, kvankam ne nova en la repertuaro de Yvart, tute egale fortege frapas kaj pleje impresas. Ankaŭ en aliaj kantoj ne ĉiam temas pri plena feliĉo aŭ kontento pri la vivo, sed la muziko ĉie estas leĝere optimisma aŭ almenaŭ neŭtrala. *Povra Marteno* estas tute alia — kanto pri pezega sorto de kamparano (“Por perlabori sian vivon / de frumateno ĝis vesper’ / iris li por ŝpati la teron ‘ en ĉiu lok’, ĉiu veter”) postlasas preskaŭ animan doloron en ĉiu aŭskultanto, nelaste pro taŭga muzika aranĝo. Sendube tia kanto devis esti en la albumo por variigi la ĝeneralan humoron.

Aparte menciendas ankaŭ la kanto *Milito*, la lasta surdiske. Ni aŭdas konfesojn de soldatoj, kiuj rakontas pri sia armea ekzisto, kaj evidentiĝas, ke ili estas tute ordinaraj homoj, kiuj ne volas morti:

*Ŝatas ni la militparadojn,  
ili stimulas korbataĵojn.  
Sed tuj malsamas la rakont’,  
kiam proksimas ni de fron’.*

La teksto estas kantata nur akompane de tamburaj sonoj kaj la refrenon kantas vira koruso, kiu pli forte emfazas akrecon de la teksto.

La omaĝo al Brassens fariĝis tre belaspekta kaj belsona. Sendube, temas pri unu el plej grandaj ĝeneralaj atingoj de *Vinilkosmo* — la diskeldonejo, kiu dum multaj jaroj faras kolosan laboron por la Esperanto-muziko.

**Grigorij Arosev**



## “La Ondo de Esperanto” en la 2011a jaro

En la jaro de sia duobla jubileo (la 20-jariĝo de la relanĉo kaj la apero de la 200a numero ekde la refondo) *La Ondo de Esperanto* ricevis 556 abonkotizojn, je 47 kotizoj pli multe ol [en la 2010a jaro](#). Pli multaj abonantoj estis nur en la rekorda 2008a jaro. *La Ondo* en 2011 estis legata en 49 landoj, je kvar landoj pli multe ol antaŭ unu jaro.

	1998	99	00	01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	2011
<b>Ruslando</b>	147	133	122	115	101	98	104	92	93	91	95	85	78	86
<b>Aliaj landoj</b>	136	170	238	257	305	407	421	450	452	448	478	458	431	470
<b>Entute</b>	283	303	360	372	406	505	525	542	545	539	573	543	509	556

La kresko okazis pro la bonega laboro de niaj perantoj, pro nia propra aktivado (ĉefe en ARKONES en septembro 2010), kaj pro la deziro helpi la redakcion, kiu dum la tuta 2011a jaro laboris en tre komplikitaj kondiĉoj. Koran dankon!

Al la kresko plej multe kontribuis Brazilo (+11) pro la solidara donaco de dek abonantoj, Ruslando (+8), Francio (+7), Germanio (+6) kaj Usono (+6). La plej granda malkresko okazis en Finnlando (-6) kaj en Hispanio (-4).

Jen landoj kun pli ol dek abonantoj (enkrampe estas la nombroj por 2010):

Ruslando . . . . .	86 (78)	Belgio . . . . .	19 (18)
Pollando . . . . .	59 (58)	Britio . . . . .	18 (16)
Francio . . . . .	41 (34)	Italio . . . . .	16 (17)
Germanio . . . . .	41 (35)	Serbio . . . . .	15 (17)
Brazilo . . . . .	38 (27)	Svedio . . . . .	15 (12)
Usono . . . . .	23 (17)	Japanio . . . . .	14 (11)
Hispanio . . . . .	21 (25)	Ĉeĥio . . . . .	11 (11)
Finnlando . . . . .	20 (26)	Danlando . . . . .	10 (8)

Ni esperas, ke ankaŭ en la nuna jaro *La Ondo de Esperanto* havos pli ol kvincent abonantojn, kvankam tiu nombro estos nur pene atingebla. Ne nur pro la malfavora ekonomia situacio en la mondo. Ja ekde septembro 2010 ni partoprenis nenium esperantistan renkontiĝon kaj do ne povis mem akcepti abonkotizojn por la nuna jaro, dum kutime en kongresoj kaj renkontiĝoj ni ricevas 60–80 kotizojn ĉiujare.

AIKo

## Ricevitaj libroj

*Bydgoszcz: Esperanto-kontaktoj en la mondo* / Redaktis Andrzej Grzębowski. — Bydgoszcz: Internacia Centro pri kulturo kaj turismo “Kujavio kaj Pomerelio”, 2011. — 20 p., il.; 3000 ekz. — [Donaco de ICTK].

Gonĉarov, Anatolo. *Esperanto-identeco: citaĵoj kaj komentoj*. Thaumiers: La KancerKliniko, 2010. — 24 p. — [Recenzoekzemplero].

*Instrui — Dokumenti — Organizi*: Fest-libro pro la 80a naskiĝ-tago de Claude Gacond / Editoris Irmi Haupenthal, Reinhard Haupenthal. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2011. — 394 p., il. — [Donaco de Edition Iltis].

Rodin, Sen (ps. de Filippo Franceschi). *Nu, kaj do?:* Rakontoj, raportoj, recenzoj, revoj / Antaŭparolo de Donald Broadribb. — Kluĵo: Exit, 2010. — 160 p., il. — [Recenzoekzemplero].

Дуличенко, Александр Дмитриевич. *История интерлингвистики*: Уч. пособие. — М.: Высшая школа, 2007. — 184 с.; 2000 экз. — [Aĉeto].

## Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako. 2011/12; Esperanto en Azio. 2011/73; Esperanto en Danio. 2011/5; Esperanto. 2011/12; Femina. 2010/23; Frateco. 2011/94; Ĝenerala Informilo. 2011/170; Heroldo de Esperanto. 2011/14; Internaciisto. 2010/3, 2012/1; KAE-Infomilo. 2012/77; La KancerKliniko. 2010/134,135; 2011/137,138,139,140; La Lanterno Azia. 2011/12; La Ondo de Esperanto. 2012/1; La Revuo Orienta. 2011/10,11; Le Monde de l’Espéranto. 2011/579; Literatura Foiro. 2011/252,253; Monato. 2011/11,12; 2012/1; Norvega Esperantisto. 2011/6; REGo. 2011/6; Tempo. 2011/112.

## Literatura Foiro, 2011, №252

*Mi foriris* de Carmel Mallia uverturas la 252an numeron de *Literatura Foiro*. La originala poezio nun estas ĉefa akcento: antologio el poemoj de Leen Deij, kun speciala grafika aranĝo de Perla Martinelli, situas en la mezo de la revuo kaj permesos ĝui pli ol kvardek verkojn, kun temoj tre variaj: la mond-milita tempo, amo, sociaj temoj inspiritaj de lingvo kaj vivo, naturpejzaĝoj en kiuj la maro avangardas kiel en pentraĵoj de Ajvazovskij, filozofio, kaj politiko.

Eĉ pli da originala literaturo en LF 252. Etel Zavavlav, kiu partoprenis en la du atelieroj por esperantaj verkistinoj (2009 kaj 2011 en Ĉaŭdefono) malkovros kiel naskiĝas rakonto: nun oni ĝuos la komenciĝon de *Mastrino de ringoj*, kies daŭrigo maturiĝos en sekvaj numeroj de *Literatura Foiro*.

Carlo Minnaja proponas parton el la verkata historio de la Akademio de Esperanto. La ĉapitro spuras la kialojn kaj la eventojn pri la kreo de AdE surbaze de la Lingva Komitato.

La konkluda frazo de Valdas Banaitis pri esperanto kiel lingvo sistema: *La ceremonio de fremdlingva instruado por esperanto estas nur temporaba balasto*, certe vekos demandojn kaj kial ne debaton. Pri la diverseco kaj riĉo de la lingvoj en Eŭropo eseas Gianmarco Pisa, en traduko de Nicolino Rossi.

La prezidanto de la Nepala PEN-Centro Ram Kumar Panday traktas la temon pri medio, literaturo kaj literatura medio en Nepalo (tradukis Donald Broadribb).

Listigo de la kontribuaĵoj de Claude Gacond en *Literatura Foiro* bondeziras la redakcian kunlaborinton okaze de lia 80-jara naskiĝa jubileo. HeKo

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

[www.monato.net](http://www.monato.net)

**Flandra Esperanto-Ligo**  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
monato@fel.esperanto.be

Por la decembra enigmo pri kafumado venis nur kvar respondoj, el kiuj tri estas ĝustaj. Ilin sendis: Heinz-Wilhelm Sprick (Germanio), Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando). La ĝusta respondo estas: **du kuleroj**.

El la unua kulerejo da sukero, metita en la kafotason, en la tason trafis plena kulero minus sukero, kiu algluiĝis al la interna surfaco. Metante la duan kuleron da sukero kaj kirlinte sian kafon, Zamenhof kompensis la mankantan kvanton da sukero per tiu samkvanta algluiĝinta al la ekstera surfaco de la dua kulerejo.

La loto donis libropremion al *Heinz-Wilhelm Sprick*, gratulojn!

## Proverboj trovendaj 4

Necesas solvi la enigmon de nekonata skribaĵo. En la sekva teksto kaŝiĝas du proverboj el la *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof.

≈ ∴ ≈ ĥφ∇ ≈ ∴ φ≡  
 ⊆ ∇ φ ∴ ∴ ≈ ∃ ⊆ ≡ ∴ ∴ ∴ ≈  
 € ≠ ⊆ ≡ ∇ ∴ € ≠.

∞ φ ≈ ⊇ ≡ ∃ ≈ ∴ Ψ ≡  
 ≈ ≠ ∴ € ≠ ∃ € ≠ ∇ € Ψ φ ≠ €.

Ĉiu signo prezentas literon, la samaj signoj do estas la samaj literoj. Ofte uzataj signoj kaj mallongaj vortoj eble helpas al vi trovi la “ŝlosilon” por la solvo. Respondoj venu al la redakcio antaŭ la 10a de marto 2012.

*Multe da plezuro!*

Kompilis **Nora Caragea**

## Juda humuro

### Granda apetito

Josel vetis je unu rublo, ke li eniros la bakejon kaj manĝos tie 25 pastobulojn kun prunoj. Bedaŭrinde li supertaksis siajn eblecojn. Li sukcesis manĝi nur 20 bulojn kaj tiam devis ĉesi. Rigardante melankolie la kvin restantajn bulojn li konstatis malĝoje:

— Se mi scius ke tiel okazus, mi estus manĝinta tiujn ĉi unue!

### Eraro kiu kostas

Tio okazis en Usono. Moris venis al la rabeno por peti konsilon.

Moris: “Rabeno, ĉu estas honeste, kiam homo profitas de eraro farita de alia homo?”

Rabeno: “Ne. Homo nepre ne havu profiton pro eraro de alia!”

Moris: “Ĉu vi certas, Rabeno?”

Rabeno: “Tutcerte!”

Moris: “Do, se vi estas tiom certa, bonvolu redoni al mi la cent dolarojn, kiujn mi pagis al vi por edzigi min!”

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

### el la kolekto de reduktoro

#### Kiu kreis Zamon?

... la pola popolo, al kiu ni sentas nin familiara precipe pro la kreinto de Zamenhof. (SIBAYAMA Zyun’iti, 11 apr. 2010, yahoo-grupo landa-agado, mesaĝo 14631)

#### Nia praprimato

... estas plene egale, ĉu Zamenhof estis... ĉimpanzo aŭ orangutan[go]... (Simono Pejno, 4 jan 2012, [liberafolio.org/2011/la-zamenhoftaga-saluto-de-probal-dasgupta#1325686184](http://liberafolio.org/2011/la-zamenhoftaga-saluto-de-probal-dasgupta#1325686184))

#### Eble li estis ĉevalo!

Antaŭ 100 jaroj — forgesita gazeto de Henrisko Zamenhof (Komuniko de *La Ondo de Esperanto*, 30 dec 2011, yahoo-grupo landa-agado, mesaĝo 16581)

#### La pupestro

Antaŭ iom pli ol 120 jaroj Zamenhof puplikis “La Lingvo internacia” poste nomita “Esperanto”... (Attilio Liotto, 10 aŭg 2011, google-grupo lakaravelo)

#### Standardo sen kritiko

Flaget-girlando. Rubando (6m) kun ok Esperantaj flagetoj triangulaj (40x30cm). Recenzoj mankas. ([katalogo.uea.org/index.php?inf=8741](http://katalogo.uea.org/index.php?inf=8741))

#### Pentri tutkore pri sia peko

Pentisto sciis desegni kaj pentri (Pavel Rak. *Malnovaj metioj // Juna Amiko* 2011, №3, p. 51.; rimarkis Ionel Onet)

#### Misio sen alveno

... la Administra Komitato de LF-koop (KALiFo) nomumis c-inon Etel Zavadlav dumtempa redaktoro de “Heroldo de Esperanto”... Pasis pli ol monato kaj... malgraŭ pagita flugbileto, ŝi ne alvenis al Ĉaudefono... KALiFo deduktas ke c-ino Zavadlav ne akceptis la postenon (Marc Hiltbrand. *Zavadlav rezignis, Bartek surpostene // HeKo* 494 4-B, 5 nov 2011, [esperantio.net/index.php?id=1827](http://esperantio.net/index.php?id=1827))

#### Misio plej intima, aŭ: Parlamento kaj sintento

[Eŭropa Esperanto-Unio] esploras la sintentojn de membroj de la Eŭropa Parlamento. (Amasmesaĝo de Seán Ó Riain, 28 apr 2011)

#### Ĉu ĉio samlitere?

Koformismo en la Esperanta gazetaro (*Spegulo*, 2008, №2, p. 131; rimarkis Ionel Onet)

Plukis **István Ertl**



Bildo de Maria Sokolova



## Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

- Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza
- Aŭstrio:** Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg
- Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
- Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF
- Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE
- Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia
- Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady
- Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø
- Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare
- Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki
- Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris
- Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz
- Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell
- Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest  
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest
- Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W
- Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík
- Italio:** IEF, Via Vioresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste
- Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042
- Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell
- Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703
- Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb
- Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)
- Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga
- Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C
- Meksiko:** Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos, Av. 523, No.187, 1a Seccion de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero México D.F., CP 07969
- Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
- Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo
- Nov-Zelando:** G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630
- Pollando:** PEA, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa
- Portugaliao:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa
- Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205
- Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd
- Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin
- Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441
- Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå
- Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen
- Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



**Esperanto-urbo.** Dum la jarŝanĝaj ferioj kadre de la alternativa renkontiĝo SANO-2 en Herzberg kunvenis diverslandaj partoprenantoj por malmultekoste, tamen komforte kaj libere ĝui la kunestadon, kleriĝi, promeni, amuziĝi kaj renkonti la 2012an Jaron ekde ties alveno al Nov-Zelando. (ICH)




**Germanio.** La kerno de la 28a Internacia Festivalo en Xanten (vd. p. 9), estis la Silvestra Balo, dum kiu oni plurfoje festis la alvenon de la Nova Jaro laŭ la horzonoj de urboj kaj landoj, el kiuj venis la partoprenantoj. Sur la supra foto estas Novjarfesto en la Moskva kaj Armenia horzono. (Brian Moon)



**Ruslando.** La 17an de decembro en konferencejo de la hotelo *Granda Uralo* pli ol 40 uralaj esperantistoj kunvenis por festi la Zamenhof-Tagon kun prezento de novaj libroj, filmoj, koncerto kaj skajpa konferenco. La programon aktive partoprenis finintoj de la ĵus okazinta Esperanto-kurso. (Aleksander Osincev)




Fjodor Dostojevskij.  
*Blankaj noktoj*: Ses prozaĵoj.  
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.  
*Ĉeriza ĝardeno*: Noveloj, dramoj.  
352 paĝoj, € 27,0.



Rusa Novelaro. Volumo 1  
*La 19a Jarcento*.  
400 paĝoj, € 30,0.




*Samideanoj*: Satori kaj humuraĵoj  
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.  
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.  
*Amiko el la junaĝo de Maigret*.  
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.  
*Diverskoloro*: Originalaj prozaĵoj.  
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.  
*Historio de Esperanto*.  
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof  
*Mi estas homo*.  
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.  
*En la serĉado de la mondlingvo*.  
160 paĝoj, € 15,0.